


中國新道


EL POPOLA


CINIO





La fama lamaisma templo Dazhao situas en la centro de Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto. Ĝi estis konstruita meze de la 7-a jc. Tie estas kultataj statuo de Ŝakjamunio, alportita de princino Wencheng de Tang-dinastio (618-907), sennombraj statuoj de la fondintoj de budhismaj sektoj, statuoj de la tibeta reganto Sunzamkampo kaj princinoj Chizun kaj Wencheng. Tie konserviĝas pormesaj muzikiloj kaj historiaj restaĵoj de diversaj dinastioj post la 7-a jc. Tie estas ĝuindaj ankaŭ koloraj freskoj. Ĉiuj religiaj aktivadoj de la urbo okazas en la templo. Foto de WU XINHUA





INTER NI

De multaj jaroj mi estas via abonanto kaj leganto. Mi ĉiam admiras ne nur belan aspekton de via revuo, sed ankaŭ bonan lingvouzon, sed post via (GRATULINDA) 40-jara ekzisto iu el vi ekhavis la ideon (laŭ mi strangan) "makuli" la tekstojn per tute nenecesaj desegnaĵoj. Ekz. sur la teksto de "Sorto" n-ro 9, paĝo 31, oni per desegno detruis entute la tekston, kiu por la leganto fariĝis nedeĉifrebla, kaj tio ĝuste trafis la tekston por komencantoj. En la teksto sur paĝo 42 estas inversa situacio, tie la teksto estas legebla, sed la desegnaĵoj nekompreneblaj. Lige kun tio mia demando: kiucele fari tiujn desegnaĵojn?

Ili absolute ne plibeligas la revuon, sed malfaciligas la legadon (kaj tio certe ne estis via celo, ĉu?)

Do mi esperas, ke vi ne plu faros tion.

M.H.KOLINSKA
(Nederlando)

La rimarkigo de s-ino Kolin-ska estas tute prava. Ni faris tion kun la celo ŝpari la spacon kaj plibeligi la paĝaranĝon, sed la rezulto ne estis dezirata. Certe ni tuj ĉesos provi. Kritiko kaj sugestoj de niaj legantoj ĉiam estas valoraj kaj bonvenaj.

La Red.

S-ano Nikolao Zitinskij de Sovetunio skribis, ke ni konigu ĉinajn vestojn en la revuo. Ekde tiu ĉi numero nia revuo prezentas ĉinajn vestojn kaj ties projektintojn en la rubriko "Modernaj Vestoj" en ĉiu dua monato.

Iuj legantoj deziras sin distri per ĉinaj karikaturaj, proverboj, fabloj, ludoj, scioj kaj humuraĵoj. Ni ĝuigos niajn legantojn tiuflanke en la rubriko "Amuzoj".

La Red.

Birdoj
Foto de HU NAICHANG


ENHAVO

- 14 Vilaĝaj entreprenoj leviĝantaj
- 6 **Akvokonduka konstruado en la baseno de Haihe-rivero**
- 10 Impreso pri Ili
- 16 **Polipartia kunlaboro de Ĉinio**
- 19 Oro-serĉantoj
- 31 Antikvaj astronomiaj instrumentoj sur Zijin-monto
- 21 Arto enradikiĝinta en flava tero
- 47 **LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (21):**
La vojo Tengchonglu
- 37 **AMUZOJ**
- 52 **EL ĈINAJ GAZETOJ**
- 36 **MODERNAJ VESTOJ:**
La ĉarmo de bluo
- 28 **TRA LA MONDO:**
Fronger-parko de skulptitaj statuoj en Oslo
- 33 **Vojaĝo en Tibeto (I)**

- 26 Karakterizado de la diablo per proverboj
- 39 Profunda amikeco
- 30 **SUR NIA LIBROBRETO:**
Ĝuo por la okuloj
- 38 **POR KOMENCANTOJ:**
Inspiro de ebriiĝo
- 41 **ESP-NOVAĴOJ**
- 4 **INTER NI**
- 35, 40 **KORESPONDI DEZIRAS**
- 42 **KURANTAJ AFEROJ**
- SUR LA KOVRILO:**
Gaja tamburado Foto de LING YOUJUAN
- 2 Dazhao-templo en nokto Foto de WU XINHUA
- 4 Birdoj Foto de HU NAICHANG
- 54 Temploj en Wutai-montaro Fotoj de YAN JIN
- 53 Kajtoj de Yangjiabu Fotoj de WU XINHUA
- 44 Surrokaj bildoj en Helan-montaro Fotoj de WU XINHUA
- SUR LA DORSKOVRILO:**
- [ĈINAJ POŝTMARKOJ]**
Poŝtmarkoj pri astronautiko

LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO

- 1. Qinhuangdao (p. 6)
- 2. Shijiazhuang (p. 6)
- 3. Wuxi-gubernio (p. 14)
- 4. Zhaoyuan-gubernio (p. 19)
- 5. Xining (p. 33)
- 6. Lhasa (p. 33)
- 7. Yining (p. 10)
- 8. Shanxi-provinco (p. 21)
- 9. Nankino (p. 31)







Akvokonduka konstruado en la baseno de Haihe-rivero

Baiyangdian-lago


Tianjin ĉe Haihe-rivero





Teksto de WANG HANPING


Fotoj de WANG YOUSHENG



Panjiakou-akvorezervejo

La akvodivida kluzo de Luanhe-rivero

Miyun-akvorezervejo en somero



LA baseno de Haihe-rivero, tra kiu fluas la riveroj Haihe kaj Luanhe kun siaj alfluantoj, estas unu el la 7 plej grandaj basenoj en Ĉinio. Ĝi ampleksas 310 000 kvadratajn kilometrojn, inkl. de pluraj provincoj kaj municipoj ekz. Pekino, Tianjin, Tangshan, Qinhuangdao, Shijiazhuang k.a. En la norda kaj okcidenta partoj de la baseno estas montregiono, kaj en ĝiaj mezo kaj sudoriento — ebenaĵo, parto de la Nordĉinia Ebenaĵo. Tie la tero estas fekunda, mineraloj riĉaj kaj la trafiko facila, kio tre helpas disvolvon de la industria kaj agrikultura produktado.

AKVA KRIZO

En Ĉinio la akvofontoj sin trovas disproporcie: sude de Yangzi-rivero ili estas riĉaj dum norde de la Flava Rivero — malabundaj. La baseno de Haihe-rivero troviĝas norde de la Flava Rivero. Tie la pluvokvanto estas malmulta kaj al la baseno tre mankas akvo. En la 7 unuaj jaroj de la 80-aj jaroj, la baseno suferis sekegecon kaj tie pluraj riveroj fariĝis senakvaj. Ankaŭ Baiyangdian-lago kun areo de 360 kvadrataj kilometroj, kie kun-

fluas 9 riveroj, sekigis kaj ĝiaj akvoproduktaĵoj detruigis. Antaŭe ŝipoj de Baiyangdian-lago povis veturi en la urbon Tianjin. Nun riveroj ŝlimas kaj naviglinioj longaj je pli ol 1 000 kilometroj estas nenavigeblaj. Cetere, pro disvolviĝo de la urba konstruado kaj multiĝo de loĝantoj, la industrio, agrikulturo kaj urba vivo postulas pli kaj pli da akvo, kio estas la alia kaŭzo de la akva krizo. Antaŭ 30 jaroj ne mankis akvofonto en la baseno. Poste la surtera akvo ne sufiĉis por la uzado kaj oni komencis eltiri subteran akvon. La trouzado de la subtera akvo kaŭzis grandarean malleviĝon de la subtera akvoniĝo kaj tersurfaco. En Liuhe-baseno okazis tia incidento: iu kamparano iris tirante bovon kaj subite la bovo malaperis. La kamparano retrorigardis kaj vidis, ke la bovo falis pro malleviĝo de la tero. Tangshan-stadiono estas tre bela. Bedaŭrinde, ĝia trejna sporthalo estas neuzebla pro grunda kaviĝo. Pli terure estas en Tianjin. La tuta urbo malleviĝis ĉ. 2 metrojn.

Akvomanko rekte malhelpis la industrian kaj agrikulturan produktadon kaj la ekonomian disvolviĝon. En sekaj jaroj elektrejoj kaj fabrikoj ne povis funkcii kaj oni

devigite ĉesis konstrui fabrikojn de kemifibroj kaj kaŭstika sodo. La regiono Xiaozhan de Tianjin famis pro sia bonkvalita rizo. La pekianoj prenis manĝi la rizon de Xiaozhan kiel feliĉon. Sed en la pasintaj jaroj la rizkampoj ne povis esti kultivataj pro akvomanko kaj la pekianoj perdis tiun frandaĵon. Pro la akva superkonsumado fariĝis malfacila ankaŭ la trinkado. Komence de la 80-aj jaroj en Tianjin okazis akva krizo. Oni devigite trinkis la malbonkvalitan adstringan akvon. Tianjin-anoj multe suferis de tio. Se oni veturis al aliaj lokoj tiutempe, multaj el ili portis akvon al siaj hejmoj por ke maljunuloj kaj infanoj ĝuu la bongustan akvon. Cangzhou estas bona loko. Tie iam naskiĝis multaj belulinoj, sed nun tieaj geknaboj havas flavajn dentojn kaj la ostoj de multaj adoltuloj fariĝas fragila. Tion kaŭzis ke ili longtempe trinkis la fluoran subteran akvon.

AKVOKONDUKAJ KONSTRUOJ

Por eviti akvan krizon kaj kontentigi la bezonon de la industrio, agrikulturo kaj homa vivo pri akvo, la ĉina registaro nun alte taksas la ekspluatadon kaj utiligon de

La tajdimuna kluzo de Haihe-rivero





Yansai-lago

la akvofontoj en la baseno de Haihe-rivero. En la pasintaj 40 jaroj, en la baseno oni konstruis 1 900 akvorezervejojn por laŭplane distribui akvon al diversaj urboj kaj regionoj.

Pekino, la ĉefurbo de Ĉinio, kun pli ol 10 milionoj da loĝantoj konsumas grandan kvanton da akvo. Jam en la 50-aj kaj 60-aj jaroj, oni konstruis Guanting- kaj Miyun-akvorezervejojn en la supraj basenoj de la riveroj Yongding kaj Chaobai, kiuj retenis akvon de kelkaj riveroj. Poste oni fosis kanalojn kaj kondukis akvon el la akvorezervejoj en Pekinon. Ekde tiam Pekino havis fiksjajn akvofontojn.

Antaŭe ankaŭ Tianjin kondukis akvon el Miyun-akvorezervejo. Poste la ĉina registaro decidis ke Miyun-akvorezervejo estu disponata sole de Pekino por kontentigi ĝian bezonon de akvo. Tio kaŭzis al Tianjin akvan krizon. Pro tio multe ĉagreniĝis la gvidantoj de la Tianjin-a magistrato. Ili mobilizis urbanojn kaj rekviziis materian kaj finanĉan fontojn por konduki akvon el Luanhe-rivero je 250 kilometroj fore kaj konstruis tie la grandiozan Panjiakou-akvorezervejon, kiu retenas la fluantan akvon de la tuta rivero. La akvokondukantoj hakis mon-

tojn, boris tunelojn, konstruis kanalojn, kondukis akvon de Luanhe-rivero en Haihe-riveron kaj de tie al la hejmoj de milionoj da urbanoj, puriginte kaj desinfektinte ĝin en akvo-provizejoj. En la tago de la lanĉo de la kanalo en 1983, la magistrato donacis 0.1 kilogramon da teo al ĉiu urbana familio por ke ĝi infuzu teon per la dolĉa akvo de Luanhe-rivero. Ekde tiam la Tianjin-anoj finis la historion de trinkado de la amara akvo. La akvo de Luanhe-rivero vigligas la ekonomian konstruadon de Tianjin, kaj dank' al tio la industria produktado de la urbo pliiĝis meznombro je 9% ĉiujare.

En Panjiakou-akvorezervejo troviĝas granda akvodivida kluzo. Tie la torenta akvo el la akvorezervejo dividiĝas en du partojn: unu al Tianjin kaj la alia al Tangshan. Antaŭ 15 jaroj granda tertremo ruinigis la tutan Tangshan. Nun nova moderna pez-industria urbo staras sur la ruino. Ĝi havas sian Douhe-akvorezervejon kaj ankaŭ akvofonton de Luanhe-rivero, tial akvo sufiĉas por la urbo. Trinkinte akvon de Luanhe-rivero, la ĉemara alkala tero en la antaŭurbo fariĝis senlima rizkampo.

Pli ol 100 kilometrojn oriente de Tangshan estas la ĉemara urbo

Qinhuangdao. Yansai-lago inter montoj de la norda antaŭurbo longas je dekoj da kilometroj. Tie la montoj estas verdaj kaj la akvo klara. La lago efektive estas akvorezervejo, kiu retenas la akvon de Shihe-rivero. Ĝi estas la granda akvovazego de Qinhuangdao. Sed en la vazego la akvo ne estas abunda kaj latentas akva krizo en la urbo. Nun la magistrato serĉas novan akvofonton. Oni konstruas kanalojn 100 kilometrojn fore por konduki akvon el Qinglong-rivero en Yansai-lagon, por ke Qinhuangdao havu sufiĉe da akvo.

ELKONDUKI AKVON DE ALIAJ BASENOJ


En la baseno de Haihe-rivero oni konstruis akvorezervejojn por reteni akvon, fosis kanalojn por konduki akvon kaj fosis putojn por ĉerpi akvon kun celo plejble utiliĝi la akvofonton de la baseno kaj forigi akvan krizon. Sed la akva krizo ne estas radikale forigita pro la terura manko de akvo en la baseno.

Kie estas la elirejo? Oni devas elkonduki akvon de aliaj basenoj, t.e. konduki akvon el Yangzi-rivero kaj la Flava Rivero al la baseno de Haihe-rivero, por radikale forigi la akvan krizon. En la lastaj jaroj akvoutiligaj departementoj fosis akvan kanalon longan je 714 kilometroj proksime de Zhengzhou, la ĉefurbo de Henan-provinco, por konduki akvon de la Flava Rivero en Baiyangdian-lagon. Krome, oni planas pumpi akvon de Yangzi-rivero ĉe Yangzhou de Jiangsu-provinco en la Grandan Kanalon. La akvo trapasos Weishan-lagon de Shandong-provinco, subiros sub la Flava Rivero kaj fine atingos Tianjin kaj Pekinon. Kompreneble tio estos grandioza konstruado. Kondukinte akvon de Yangzi-rivero kaj la Flava Rivero en la basenon de Haihe-rivero, oni havos sufiĉe da akvo en la vivo, industrio kaj agrikulturo de Pekino, Tianjin kaj aliaj urboj kaj regionoj. La industria kaj agrikultura produktado de la baseno estos ne plu ĝenata. Ankaŭ la termalleviĝo estos regata. ■

Impreso pri Ili


Teksto de ZHANG MEIZHI


Fotoj de LIU SIGONG



Bakado de farunaĵo


„Foiro de tapiŝoj





Renkontiĝo survoje

Ujgura vendisto de ŝafviando



En meblovendejo



MI vizitis Ili dekkelke da tagoj. Kian impreson ĝi faris sur mi?

REMEMORO PRI LIN ZEXU

Kiel malproksime troviĝas Ili! El Urumqi, la ĉefurbo de Xinĵiang, ni tien veturis per aŭtobuso dum du tagoj. Kompreneble, oni povas veturi per aviadilo kaj tio bezonas nur unu horon. Sed por ĝui la pejzaĝojn laŭvoje, mi kaj aliaj dekkelke da vizitantoj preferis veturi per aŭtobuso. Komence, ni ĉiuj ĝojoplene parolis pri la vidaĵoj ekster la aŭtobuso, sed iom post iom la rekta asfaltita ŝoseo, senlima Gobio kaj sporadaj domoj fariĝis monotonaj kaj ne plu interesis nin. Mi nevole veis en mi mem: Kiel malproksima kaj dezerta loko! Jen kial multaj krimuloj estis ekzilitaj tien en la pasinteco. Ankaŭ la nacia heroo Lin Zexu, kiu detruis opion en Humen, estis ekzilita en Ili. Lin Zexu (1785-1850) venis kiel revizoro en Guangdong por proĥibi opion. En 1839, Lin konfiskis 20 200 kestojn da opio kontrabanditajn en Ĉinion de britaj kaj usonaj opiokomercistoj, kaj detruis la opion sur plaĝo de Humen. Lia faro akiris vastan aprobon de la popolo. Tamen pretekstante tion, Britio sendis armeon al Ĉinio. La terurita registaro de Qing-dinastio eksigis lin je la ofico kaj ekzilis lin al Xinĵiang. En Huiyuan-urbeto, proksime de Ili, ni vizitis la tiaman loĝejon de Lin. Tio estas malgranda korto kun kelke da ĉambroj kadukaj.

HORGOS, KOMERCA KANALO POR ĈINIO KAJ SOVETUNIO

Lin Zexu proĥibis opion en Humen nur por potencigi Ĉinion, sed ne por ĝin fermi kontraŭ la eksterlando kaj malpermesi importi alilandajn modernaĵojn. 150 jarojn post detruo de opio en Humen, Humen malfermis sian pordon kaj fariĝis unu el la plej fruaj specialaj ekonomiaj regionoj post la ekpraktiko de la reformado kaj malfermo

en Ĉinio.

Kiam Humen aplikis la malferman politikon, sian pordon malfermis ankaŭ Horgos, kiu distancas de la ekzilejo de Lin je kelkdek kilometroj. En 1851, Ĉinio kaj Rusio interkonsentis preni Horgos kiel unu el la komercaj kanaloj inter Ĉinio kaj Rusio. Antaŭ pli ol 2 000 jaroj, Ili estis pasejo de la Norda Silka Vojo, tra kiu multaj karavanoj transportis varojn al Meza Azio, Okcidenta Azio kaj Eŭropo. En 1949, post la fondiĝo de la nova Ĉinio, Horgos fariĝis la plej granda komerca kanalo por Ĉinio kaj Sovetunio. Sed poste malagrablaĵoj okazis inter Ĉinio kaj Sovetunio, kaj Horgos remalfermiĝis en 1983.

Matene, en malvarmeta vento, nemalmultaj homoj jam atendis en la korto de la doganejo de Horgos por iri al Sovetunio. Montrante per fingro maljunulinon apud si, iu ujugura virino diris al mi, ke la maljunulino estas ŝia patrino. Ŝi revenis por viziti la parencojn. En Xinĵiang, multaj loĝantoj havas parencojn en Sovetunio. La malfermo multe faciligis interviziton. Dum nia interparolo en la korton senĉese venis homoj kun valizoj grandaj kaj malgrandaj, kaj la korto estis plenkla.

K-do Wang, direktoro de la Administracio de la Komerca Kanalo, informis min, ke ĉiujare ĉ. 50 000 homoj en- kaj ellandiĝas tra Horgos kaj la jara transigita varo superis 130 000 tunojn. Montrante amasojn da ŝtalaĵoj kaj kemisterko sur

staplejo, k-do Wang diris al mi, ke ili estis importitaj el Sovetunio kaj Ĉinio eksportas al Sovetunio ĉefe malpezindustriaĵojn kaj tekstilaĵojn. Tiam, tri kamionoj fajfante eniris en la staplejon. Tiun tagon la importaĵo estis kotono.

FRUKTOSTANDOJ

La Ili-a Kazaha Aŭtonoma Subregiono gvidas 3 distriktojn kaj la urbo Yining estas la ĉefurbo de la subregiono. En la urbokonstruo Yining ne diferencas de multaj mezgrandaj urboj en norda Ĉinio, sed ĝia klimato estas simila al tiu en la regiono sude de Yangzrivero. Dank' al la naturdotitaj kondiĉoj, tie kreskas tre multaj dolĉaj fruktoj. Sur longa strato viciĝas standoj de vinberoj, piroj, pomoj, persikoj kaj aliaj fruktoj. La mastroj, ujuguraj junuloj, energie ofertis al pasantoj. En Yining, la

Fruktostando



prezo de fruktoj estas duona de la pekina. Dum nia restado en Yining ni ofte aĉetis multe da fruktoj por frandi. Akvomelonoj de Yining estas dolĉaj kaj grandaj, kaj vendistoj distranĉis ilin por vendi. Freŝaj kaj aromaj akvomelonoj allogis abelojn.

Ankaŭ bazaro de Yining estas fama. Dimanĉe, multaj etvendistoj viglis sur stratoj, ofertante ŝuojn, vestojn, ŝtofojn, meblojn... En Yining funkcias granda bazaro de industriaĵoj, kie vendas pli ol 500 standoj. Foje, laca pro longtempa promenado, mi paŭzis antaŭ iu stando kaj ekbabilis kun ĝia mastro. Li estis 50-jara, bareliginta ujuguro, en eŭropa pantalono, similis al granda kapitalisto. Li diris al mi kun rideto, ke multaj el la tieaj etvendistoj estis senlaboruloj antaŭe kaj plejparte komercas en malgranda kapitalo. Pro konkurenco de tro multaj etvendistoj la negocoj ne estas facilaj. Ĉe tio li ofertis al mi grandan kvadratan kaptukon el Sovetunio.

LA KAZAĤOJ

La kazaĥa nacio estas la plej multnombra nacimalplimulto en Ili kaj vivas nomade, tial en la urbo Yining loĝas nemultaj kazaĥoj.

Por intervjui kazaĥojn, mi venis en Narat-herbejon. En profunda aŭtuno, la herboj flaviĝis kaj la arboj sur proksimaj montoj estis ruĝe kaj flave kolorigitaj. Narat distancas de Yining 125 km. Mi tute ravigis, kiam la vasta herbejo etendiĝis antaŭ mi. En la ujugura lingvo, Narat signifas "lokon de sunleviĝo". La suno karesas la vastan herbejon, la malproksimajn neĝajn montpintojn, la feltajn jurtojn dislokiĝantajn sur la stepo... kaj ĉio tio skizis pompan bildon.

Kazaĥoj estas malkaŝemaj kaj la rozaj vizaĝoj de kazaĥaj virinoj kaj infanoj indikas ilian bonan sanon. Iliaj geknaboj komencis rajdi sur ĉevalo de sia knabeco. Kazaĥoj ŝatas ĉevalinan lakton, opiniante, ke ĝi povas forigi malsanon kaj fortigi la korpon. Malvarmeta kaj acideta, la ĉevalina lakto



Ĉina doganejo en Horgos

iom similas al jahurto en Pekino. Paŝtante, kazaĥoj loĝas en feltaj jurtoj, kaj plejparte emas pendigi plurajn manfaritajn brodaĵojn helkolorajn. 50-jara mastro de iu jurto havas 10 gefilojn kaj 5 nepojn. Informiĝinte, ke mi, 35-jara, havas nur unu filinon, ŝi ekkriis kun miro: "Ho, tio estas nekredbla." Ankaŭ mi ne komprenis, kial ŝi povis naski tiel multe da infanoj, kvankam mi scias, ke Ĉinio aplikis en nacimalplimultaj regionoj favoran politikon ne nur en la ekonomia konstruado, sed ankaŭ en

naskolimigo. La dezerta stepo ja bezonas pli da homoj.

Forironte de Ili, mi speciale vizitis Ili-riveron. De miloj da jaroj, estas ĝi, kiu nutras sian fekundan basenon, sian longedaŭran brilan kulturon. Ili devenis de la nomo de la rivero. Aŭtune la rivero silente kaj malrapide fluas okcidenten tra sub la impona pontego. La rivero estis borderita de vicoj da arboj, sur kiuj pepas birdoj. Starante borde de la rivero, mi ĝuis la aŭtunan kvieton, rememorante ion aŭ ŝajne nenion pensante. ■

Bulgara Esperantisto

monata organo de BEA

Varia kaj intereskapta enhavo, riĉe ilustrita per bonkvalitaj fotoj kaj grafikaĵoj; aktualaj artikoloj kaj informaĵoj pri la bulgara kaj tutmonda E-movadoj; legindaj publikaĵoj en la rubrikaj: "Originala verkaro", "Esperantologio kaj Interlingvistiko", "Lingvaj demandoj", "Juna Esperantisto", "Verdaj steletoj" /porinfanaj/, "Leteroj de korespondamikoj", "Dezirata korespondi", "Distroj" k.a.

Legantoj en pli ol 51 landoj. Jarabono: 32 gld. aŭ egalvaloro.

Abonebla ĉe la Libroservo de UEA, la naciaj poŝtoj kaj ĉe perantoj en multaj landoj.

Petu provekzempleron ĉe la Redakcio: "Bulgara Esperantisto", p.k. 66, BG - 1000 Sofia.

Vilaĝaj entreprenoj leviĝantaj

ANTAŬ nelonge la ĉina registaro ekpraktikis sian unuan leĝon pri vilaĝaj entreprenoj — “Regularo de la Vilaĝaj Entreprenejoj de Kolektiva Posedanteco de la Ĉina Popola Respubliko”. Tio signifas, ke 18.7 milionoj da vilaĝaj entreprenoj en Ĉinio ricevis leĝan protekton.

Iam la ĉinaj vilaĝaj entreprenoj en la okuloj de la popolo estis nur tio, per kio kamparanoj lukras poŝmonon. Nun ili estas tre prosperaj. Laŭ kalkulo de koncerna departemento, la totala jara produktovaloro de la ĉinaj vilaĝaj entreprenoj jam atingis 753 miliardojn da juanoj. En 1989 ĝi konsistigis 25% de la totala socia produktovaloro kaj 28% de la totala industria produktovaloro de la lando (egala al la totala socia produktovaloro kaj la totala industria produktovaloro de la lando en 1979). La vilaĝaj entreprenoj jam povas fari multe da produktaĵoj unuaklasaj en kaj ekster la lando. Pli ol 20 el la produktaĵoj gajnis la internacian oran, arĝentan aŭ bonkvalitan premion kaj multaj produktaĵoj povas esti liberaj de kontrolo, kaj eksterlandaj komercistoj opiniis ilin fidindaj. Fama usona agrikultura ekonomikisto havis jenan impreson pri ĉinaj vilaĝaj entreprenoj: “Ĉinio en aparta maniero transigis kamparanojn al neagrikultura laboro, t.e. energie disvolvi la vilaĝajn entreprenojn. Ili certagrade solvis la problemon de senlaboreco en grandaj urboj, ankaŭ senĉese kreskigis la neagrikulturan produktovaloron en la kamparo kaj altigis la nivelon de konsumado kaj akumulado en la kamparo. Ili estas vivoplenaj.”

PROSPERIGO EN LA KAMPARO

En jaroj post 1949 Ĉinio ĉiam havis strukturon de duala ekonomio, “la urboj zorgas pri industrio kaj la kamparo pri agrikulturo”. Sub tia situacio neniam malaperis la postĝinteco de la ĉina kamparo. En la posta periodo de la 70-aj jaroj la taga enspezo de diligenta viro en multaj vilaĝoj de Ĉinio ne pli valoris ol unu kokovo.

Post malriĉa vivo, en 1979, kiam Ĉinio komencis ekonomian reformadon, la ĉinaj kamparanoj, kiuj konsistigas 80% de la tutlanda loĝantaro, ekiris plej antaŭe kun forta deziro ŝanĝi sian sorton. La kamparanoj de Wuxi-gubernio de Jiangsu-provinco iniciatis vilaĝajn entreprenojn. La loĝantoj de tiu gubernio estas ĉirkaŭ milono de tiuj de la lando, sed la areo de la kampoj nur dekmilono de tiu de la lan-

do. El la severa fakto oni konkludis, ke eĉ se la kamparanoj zorgeme kulturas la agroj, ili ankoraŭ ne povas vivi riĉe, tamen torento de granda nombro da kamparanoj al urboj povas pezigi la ŝarĝon de la urboj. Sekve oni ekfunkciigis industriajn entreprenojn surloke. En la 80-aj jaroj dekmiloj da kamparanoj de tiu gubernio laboris en la vilaĝaj entreprenoj funkciigataj de ili mem. Nun la gubernio jam fariĝis unu el la du gubernioj en Ĉinio, kies jara financa enspezo superis 400 milionojn da juanoj.

La ekzemplon de Wuxi sekvis aliaj gubernioj de Ĉinio. Vilaĝaj entreprenoj aperis kiel fungoj post pluvo. En la pasintaj dek jaroj la vilaĝaj entreprenoj elspezis 20 miliardojn da juanoj por agrikultura konstruado, trione kiom la samperioda ŝtata budĝeto por agrikulturo. Precipe en la lastaj 5 jaroj duono de la neta enspezo de la kamparanoj

La vestofarejo Fenghuang de Liaoning-provinco produktas vestojn ĉefe por eksporto. Jen ĝia estro Wang Xinjia montras novan veston.



devenis de la vilaĝaj entreprenoj, kiuj fariĝis grava vojo por riĉiĝo de la vasta kamparanaro. Krome, la vilaĝaj entreprenoj donis ŝancon de laboro al 100 milionoj da superflujaj kamparanoj, kiuj en la vilaĝaj entreprenoj ricevis bapton de moderna industrio kaj modlas novajn figurojn de la ĉinaj kamparanoj.

La vilaĝaj entreprenoj ne dependas de ŝtata investo kaj estas funkciigataj de kamparanoj mem. Nun ili jam fariĝis nemalhavebla parto en la ĉina ekonomio. En Jiangsu-provinco prosperas la vilaĝaj entreprenoj, kies ekonomio okupas duonon de la provinca ekonomio. En Shandong-provinco, kie ekonomio estas nove levita, la ekonomia forto de la vilaĝaj entreprenoj konsistigas preskaŭ duonon de tiu de la provinco. Eĉ en Ŝanhajo, kie industrio okupas la ĉefan lokon en ekonomio, la produktovaloro de la vilaĝaj entreprenoj konsistigas ĉ. kvinonon de la totala industria produktovaloro de la urbo. En 1989 la

produktokvanto de karbo de la vilaĝaj entreprenoj konsistigis trionon de tiu de la ŝtataj entreprenoj, la produktokvanto de cemento 32%, tiu de vestoj 70%, tiu de silko 44%, tiu de drapo 52.3%, tiu de malgrandaj agrikulturiloj 80% kaj tiu de brikoj 93%. Kontraŭ siaj eksportaĵoj la vilaĝaj entreprenoj ricevis 8.02 miliardojn da usonaj dolaroj, preskaŭ kvinone kiom la ŝtataj entreprenoj.

ŜTATAJ KONDIĈOJ DECIDAS

La rapidan disvolvigon de la ĉinaj vilaĝaj entreprenoj decidas specifaj ŝtataj kondiĉoj.

Multe da homoj, malmulte da tero, neprospera komerca ekonomio kaj malfacile altigebla produktiveco estas la ĉefa kaŭzo, kial la ekonomio de la ĉina kamparo estis postginta dum longa tempo. En la komenca periodo de la 50-aj jaroj ĉiu kamparano de Ĉinio posedis pli ol 9 *mu*-ojn (15 *mu*-oj = unu hektaro)

da agroj kaj en la posta periodo de la 70-aj jaroj apenaŭ 4 *mu*-ojn. Kalkulate laŭ la poka-pa areo de agroj en 1952, la ĉina kamparo fakte havis ĉ. 200 milionojn da superflujaj kamparanoj, kiuj restis sur la limigitaj agroj. Tio ne nur ne povis efike progresigi la agrikultur-an ekonomion, sed male rekte malhelpis la altigon de la agri-

kultura produktiveco. Iu esplora raporto de la Ĉina Akademio de Sciencoj montras: En la 50-aj jaroj en la ĉina kamparo unu porcion da manĝaĵo ricevis unu homo, sed en la 70-aj jaroj du porciojn da manĝaĵo ricevis tri homoj. Inter 1952 kaj 1978 la produktiveco de la ĉina agrikulturo kreskis je nur 3.5%.

Por industriigo la evoluantaj landoj alprenas du rimedojn. Unu estas priirabi kolonion, bankrotigi siajn kamparanojn kaj fari akumuladojn por disvolvi industrion kaj plie efektiviigi industriigon. Kaj la alia estas, ke ŝtato investas kapitalon por industriaj entreprenoj, ke superflujaj kamparanoj ricevu okupon.

Evidente, la du rimedoj ne taŭgas por Ĉinio. En Ĉinio por doni laboron al unu homo oni devas investi ĉ. 20 000 juanojn. Se oni volas laborigi 200 milionojn da superflujaj kamparanoj, oni bezonas 4 000 miliardojn da juanoj por investo. Tiom da mono Ĉinio ne povas kolekti. Kaj plie, Ĉinio havas multe da loĝantoj. Ĉar en ĝiaj urboj same kiel en ĝia kamparo senĉese kreskas la nombro de tiuj, kiuj deziras okupon, kaj ĝi ne havas forton solvi la problemon de la superflujaj kamparanoj, tial fondo de vilaĝaj entreprenoj kaj efektiviigo de industriigo kaj urbanizo estis streboj de Ĉinio en la lastaj jaroj por solvi la supre diritan problemon.

Laŭ statistiko de la Agrikultura Ministerio de Ĉinio, en 1989 la vilaĝaj entreprenoj de Ĉinio havis 95.4 milionojn da laboristoj, konsistigantajn ĉ. duonon de la superflujaj kamparanoj en Ĉinio. La disvolvigo de la vilaĝaj entreprenoj forte akcelis la konstruadon de la urbetoj. Nun Ĉinio havas 12 000 urbetojn, 4-oble pli multe ol en 1980.

GRANDA PROFITO

La ŝtataj entreprenoj de Ĉinio estas multe favorataj. Iliaj krudmaterialoj estas liverataj de la ŝtato, iliaj produktaĵoj aĉetataj de la ŝtato kaj ankaŭ iliaj profito kaj malprofito prirespondataj de la ŝtato, dum la vilaĝaj entreprenoj devas zorgi pri ĉio. Ĝuste tio puŝis la vilaĝajn entreprenojn al lukto por sia ekzisto.

Produktaĵoj de la Fabriko de Aĵuraj Teksaĵoj de Chumen, Zhejiang-provinco, vendiĝas en Usono, Japanio kaj aliaj landoj. Jen ĝiaj laboristinoj kontrolas produktaĵon.



La Fabriko de Universalaj Artikoj de Hangzhou situanta en Xiaoshan-gubernio de Zhejiang-provinco estas vilaĝa entrepreno estrata de kamparano-entreprenisto Lu Guanqiu. En la unuaj jaroj post sia fondiĝo la fabriko havis nur 300 juanojn da kapitalo, malnovan domon el 3 ĉambroj kaj simplajn instrumentojn. Kaj nun, post 10 jaroj, ĝi fariĝis moderna fabriko kun 1 300 laboristoj kaj ĝiaj produktaĵoj konsistigas ĉ. duonon de la samspecaj produktaĵoj de la lando. Ĉiujare ĝi ricevas 3 milionojn da usonaj dolaroj kontraŭ siaj eksportitaj produktaĵoj.

Ĝi estas tre sperta, kun malproksimvidaj gvidantoj. Universalaj artikoj nemankigeblaj por la aŭtoj tamen ne povas kontentigi la bezonon de la merkato. Sed grandaj fabrikoj ne volas produkti ilin pro ilia malgrandeco kaj malgrandaj fabrikoj ne povas pro manko de tekniko. Ĝuste en tiu situacio Lu Guanqiu decidis produkti universalajn artikojn, kaj la fakto pruvis, ke lia de-

cido estas ĝusta.

Tie ne troviĝas egalismo. En 1988 meze enspezis 5 200 juanojn la estroj de la pli ol 100 vilaĝaj entreprenoj en Mudu-urbeto de Wuxian-gubernio ĉe Taihu-lago, 4 000 juanojn la vicestroj kaj 2 000 juanojn la oficistoj kaj laboristoj. La kamparanoj komprenas, ke pli da laboro, pli da akiro. Kompreneble, estas diferenco inter bona kaj malbona laboroj, ekz. la plej multa enspezo de fabrikestro en la urbeto en tiu jaro estis 11 800 juanoj kaj plej malmulta nur 1 300 juanoj.

Tie ne troviĝas dumviva okupo. La Jiujiang-a Vestofarejo de Nanhai-gubernio, Guangdong-provinco, estas vilaĝa entrepreno. Rigardante la 12-etaĝan domon, oni eĉ ne povas kredi, ke ĝi estas vilaĝa fabriko. Mirinde estas, ke en la ĉefsezono la fabriko havas pli ol 6 000 laboristojn, sed post la ĉefsezono nur 4 000 laboristojn "Kion fari, se laboristoj ne volas forlasi la fabrikon post la ĉefsezono?" "Ni pagas

laŭpecan salajron. Kiam estas malmulte da laboroj, ili povas mem serĉi vivrimedojn en aliaj lokoj," diris gvidanto de la fabriko.

Tie ne troviĝas tro da stokoj da produktaĵoj nek pago de salajro sen distingo de bona kaj malbona laboroj. Sole en la dua duono de 1989 10% de la vilaĝaj entreprenoj en la urbo Suzhou ĉesigis produktadon pro sia malprofito. Malmultaj el ili iam depresiĝis. Post kelkaj monatoj mi refoje venis tien kaj vidis, ke ili reprosperiĝis. Laŭ statistiko de koncerna departemento, en 1989 en la tuta lando 3 milionoj da vilaĝaj entreprenoj ĉesigis produktadon aŭ sin turnis al fabrikado de aliaj produktaĵoj. Kvankam la reguligo alportis "partan doloron", tamen post la "doloro" aperis reprosperiĝo. En tiu jaro la produktokvanto de la vilaĝaj entreprenoj de la lando kreskis je 14.4% kaj ilia eksportovaloro atingis 10.5 miliardojn da usonaj dolaroj, konsistigante pli ol kvinonon de tiu de la lando. ■

LU YUN:

Polipartia kunlaboro de Ĉinio

EN la pasinta duon-jarcento la Komunista Partio de Ĉinio kaj la demokratiaj partioj formis en komuna batalo politikan sistemon de polipartia kunlaboro sub la gvido de KPĈ.


FORMIĜO KAJ EVOLUO

La Revolucia Komitato de Kuomintango, la Demokratia Ligo de Ĉinio, la Asocio de Demokratia Konstruado de Ĉinio, la Societo Jiu San, la Ĉina Asocio por la Demokratio, la Kamparana kaj Laborista Demokratia Partio de Ĉinio,

Zhigongdang-partio de Ĉinio kaj la Ligo por la Demokratia Aŭtonomeco de Taiwan plejparte fondiĝis en la 30-40-aj jaroj. En 1924, la Kompartio kaj Kuomintango de Ĉinio unuiĝis por rezisti la imperistojn kaj feŭdajn militaristojn. En 1927 Kuomintango detruis la kunlaboron kaj praktikis unupartian diktaturon. En la 30-aj jaroj eksplodis la Kontraŭjapana Rezistmilito, kaj refoje kunlaboris la Kompartio kaj Kuomintango por kontraŭbatali japanajn agresantojn. Post ok jaroj, kapitulacis Japanio, kaj Kuomintango refoje detruis la kunlaboron kaj levis grandskalan

internan militon, cele pereigi la Kompartion. En tia historia situacio, la demokratiaj partioj de Ĉinio, influate de la unuecfronta politiko de la Kompartio, starigis diversagradan kunlaboran rilaton kun la Komunista Partio de Ĉinio kaj disvolvis tiun rilaton en la revolucia batalo.

Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la demokratiaj partioj kaj la Komunista Partio de Ĉinio kune realigis la historian turniĝon kaj eltenis la gravajn provojn de la Agrara Reformo kaj Socialisma Reformo en la unuaj jaroj post la fondiĝo de la



Prof. Fei Xiaotong (dekstre), prezidento de la Demokratia Ligo de Ĉinio kaj vicprezidanto de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, en Nankino



Zhu Xuefan (meze), prezidento de la Revolucia Komitato de Kuomintango kaj vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, kaj He Luli (maldekstre), vicprezidanto de la Revolucia Komitato de Kuomintango kaj vicurbestro de Pekino

respubliko. Ili reviziis respektive sian statuton kaj decidis preni la Komunan Programon kiel sian politikan programon kaj praktikis politikan linion servi al socialismo. En 1956 la Komunista Partio de Ĉinio kiel reganta partio alprenis la principon "longtempa kunekzisto kaj reciproka kontrolo" en sia rilato kun la demokratiaj partioj kaj pluapŝe firmigis la sistemon de polipartia kunlaboro.

FUNDAMENTAJ TRAJTOJ

La polipartiá kunlaboro gvidata de la Kompartio en la procezo de formiĝo kaj perfektigo, kiel fundamenta politika sistemo de Ĉinio, havas jenajn trajtojn:

Unue, la demokratiaj partioj ĉiuj akceptas la gvidon de la Kompartio, ili kaj la lasta kontrolas unu la alian. Tio ne signifas nuligi la gvidon de la Kompartio nek starigi alternan regadon de la partioj.

Due, la demokratiaj partioj estas politikaj ligoj de parto da laboruloj kaj patriotoj respektive kontaktataj de ili, ili kune okupiĝas pri la socialisma afero sub la gvido de la Kompartio.

Trie, en Ĉinio la Komunista Partio de Ĉinio estas reganta partio kaj la demokratiaj partioj estas partioj partoprenantaj en la potenco. La demokratiaj partioj partoprenas en la interkonsiliĝo pri gravaj ŝtataj aferoj kaj elektado de la gvidantoj,

administrado de la ŝtataj aferoj, el-laborado kaj plenumado de leĝo kaj juro.

Kvare, la politika interkonsiliĝo estas grava maniero por la polipartia kunlaboro. La Kompartio alte respektas en interkonsiliĝo la volojn de la demokratiaj partioj por fari la politikojn pli demokratiaj, pli sciencaj kaj akcepteblaj de la demokratiaj partioj.

La Kompartio kaj la demokratiaj partioj prenas la konstitucion kiel sian fundamentan kriterion, kaj la lastaj ĝuas politikan liberon, sendependecon de sia organizo kaj egalecon de leĝa pozicio en la kategorioj de rajtoj kaj devoj difinitaj de la konstitucio.

KIAL ILI AKCEPTAS GVIDON DE LA KOMUNISTA PARTIO?

Kial la demokratiaj partioj, kvankam sendependaj politikaj partioj, akceptas gvidon de la Kompartio?

Chu Zhuang, vicprezidanto de la Ĉina Asocio por la Demokratio, rezonis tion en tri flankoj.

1. Analize laŭ la historio. La sperto kaj kapablo de KPC akiritaj en la malfacila kaj komplika batalo dum dekoj da jaroj ekde 1927 por regi la tutan situacion kaj administri la ŝtaton estas posedeblaj por neniu ajn demokratia partio. La de-

mokratiaj partioj plejparte fondiĝis ĉ. la venko de la Kontraŭjapana Rezistmilito, influate aŭ subtenate de KPC, kiel politikaj aliancaj amikoj de la demokratia revolucio gvidata de KPC, kaj de tiam fariĝis intimaj batalokamaradoj de KPC.

2. Analize laŭ la politiko. KPC elmetis ĝustan politikan linion konforman al la historia evoluo kaj al la fundamentaj intereso de la popolo en ĉiu grava historia turniĝo de la ĉina revolucio kaj sub gvido de la politika linio akiris venkon de la revolucio kaj konstruado de Ĉinio, mobilizante la popolon. La politika gvida rolo de KPC kaj ĝia alvoka forto super la diversaj nacioj de Ĉinio estas posedeblaj por neniu ajn politika partio de Ĉinio.

3. Analize laŭ organizo. KPC estas pionira taĉmento de la laborista klaso kaj havas diversnivelaĵajn partiajn organizojn kun pli ol 48 000 000 membroj tra la urboj kaj kamparo de Ĉinio. Inter ĝiaj membroj estas avangardaj personoj el diversaj flankoj en diversaj niveloj kaj aperadas generacio post generacio personoj, kiuj povas mobilizi la tutan popolon kaj mastri la tutan situacion. Tiu profunda kaj vasta organiza bazo de KPC formita en la historia praktiko de pli ol duona jarcento por gvido de la revolucio kaj konstruado estas posedebla por neniu ajn politika partio de Ĉinio.

REGIMO KONFORMA AL LA

NACIA STATO

Ĉinio estas socialisma lando kaj ankaŭ ekonomie kaj kulture relative postiginta kaj malekvilibre disvolviganta lando. Pli ol 800 milionoj el ĝiaj 1.1 miliardoj da loĝantoj vivas en la kamparo. Malmultaj urboj kaj ekonomie evoluintaj regionoj samtempe ekzistas kun duonnatura ekonomio de la vastaj kamparo kaj landlimaj regionoj; plej avangardaj sciencoj kaj tekniko samtempe ekzistas kun manlaboro en la vastaj regionoj; malmultaj intelektuloj posedantaj modernajn sciencajn kaj kulturajn sciojn samtempe ekzistas kun granda armeo da analfabetoj kaj duonanalfabetoj; kaj postulo pri socialisma demokratio samtempe ekzistas kun la realo sen demokratia tradicio. Sub tiaj konkretaj historiaj kondiĉoj la tasko fari socialisman konstruadon estas tre malfacila kaj tial necesas koncentrita unueca gvido, alie, se la 1.1 miliardoj da loĝantoj agus laŭplaĉe, la ŝtato falus en haoson kaj dissplitiĝon. Samtempe, ekzistas diferenco inter la malsamaj naciecoj, malsamaj regionoj kaj malsamaj ekonomiaj kaj kulturaj niveloj; interne de la laboranta popolo ekzistas malsamaj klasoj, sociaj tavoloj kaj kolektivoj; interne de la popolo surbaze de baza unueco ekzistas diferenco kaj kontraŭdiroj en konkretaj interesoj, kaj ĉio tio bezonas ne nur koncentritan unuecan guidon, sed ankaŭ plenan garantion de demokratio, vastan kontaktiĝon kun diversflankaj popolamasoj kaj kolekton de iliaj opinioj, por plej racie projekti la tutlandajn aferojn, zorgi pri diversaj lokoj kaj branĉoj kaj akordigi diversajn kontraŭdirojn. La polipartia kunlaboro gvidata de la Kompartio fariĝis fundamenta politika principo de Ĉinio kaj havas viglan vivipovon ĝuste pro tio, ke ĝi konformas al la stato de Ĉinio.

MULTFLANKA KUNLABORO

“Opinioj de CK de KPC pri Persistado kaj Perfektigo de Polipartia Kunlaboro kaj Politika Interkonsiliĝo Gvidataj de la Komunista Partio de Ĉinio” specifis plurajn flanj

kojn de la kunlaborado de KPC kaj la demokratiaj partioj en la diversaj sferoj de socia politiko kaj ellaboris realajn rimedojn, inkluzive: Plifortigi kunlaboradon kaj interkonsiliĝon inter la Komunista Partio de Ĉinio kaj la demokratiaj partioj; pli disvolvi la rolon de la membroj de la demokratiaj partioj kaj senpartiaj personoj en la popolaj kongresoj; proponi membrojn de la demokratiaj partioj kaj senpartiajn personojn al gvidaj postenoj de diversnivelaĵoj registaroj kaj justicoj kaj disvolvi la rolon de la demokratiaj partioj en la popolaj politikaj interkonsiliĝaj konferencoj. La dokumento elmetis ankaŭ al la demokratiaj partioj postulojn pri ilia ideologia kaj organiza konstruado.

En la lastaj dek jaroj, la politika interkonsiliĝo farita de CK de KPC kun la demokratiaj partioj kaj senpartiaj patriotoj pri gravaj decidoj kaj nomumado por gravaj oficoj jam fariĝis regulo. CK de KPC kunvokis demokratian interkonsiliĝan kunvenon kaj kunsidon de eksterpartiaj personoj proksimume 40 fojojn. En la lastaj du jaroj CK de KPC aŭskultis opiniojn de la demokratiaj partioj kaj aliaj flankoj pri reguligo de la ekonomia medio, reordigo de ekonomiaj ordoj kaj plena profundigo de la reformo ellaboritaj de la 3-a Plena Sesio de la 13-a Centra Komitato de KPC, pri persisto kaj perfektigo de la polipartia kunlaboro kaj politika interkonsiliĝo gvidataj de KPC, pri la gravaj decidoj pri ekonomiaj laboroj faritaj en la 5-a Plena Sesio de la 13-a CK de KPC, kaj donis sufiĉan atenton al iliaj opinioj kaj konsiloj.

Personoj el la ĉefaj gvidantoj de la demokratiaj partioj fariĝis vicprezidantoj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso kaj de la Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Nermalmutaj el la membroj de la demokratiaj partioj prenis sur sin gvidan oficon de diversnivelaĵoj popolaj kongresoj aŭ politikaj interkonsiliĝaj konferencoj. Laŭ statistiko farita en oktobro 1990, 6 el ili fariĝis vicministroj de 6 ministerioj sub la Ŝtata Konsilantaro, 1 vicprezidanto de la

Plej Supera Popola Kortumo, 11 vicprovincestroj, vicprezidantoj de aŭtonomaj regionoj aŭ vicurbestroj de municipoj, 8 vicestroj de urboj kun unuopa raporto de ekonomia plano al la ŝtato, 116 gvidantoj de provincaj burooj, urboj, prefektujoj kaj 643 vicguberniestroj aŭ vicdistriktestroj.

La membroj de la demokratiaj partioj plejparte estas mezgradaj aŭ superaj intelektuloj. Post efektivigo de la reforma kaj pordomalferma politiko, ili disvolvis sian partian funkcion kaj intelektan superecon kaj elmetis multajn valorajn konsilojn al la ekonomia konstruado de Ĉinio. Ekz., julie de 1988, CK de la Demokratia Ligo faris al CK de KPC kaj la Ŝtata Konsilantaro konsilon pri starigo de plurnacia ekonomia disvolva regiono en la supra baseno de la Flava Rivero, CK de KPC kaj la Ŝtata Konsilantaro aprobis kaj komencis efektiviĝi la projekton. Decembre de 1988, la Asocio de Demokratia Konstruado de Ĉinio, la Kamparana kaj Laborista Demokratia Partio de Ĉinio kaj la Ĉina Industriista kaj Komercista Federacio kune prezentis al la Ŝtata Konsilantaro konsilon pri perfektigo de la administra sistemo de tradiciaj ĉinaj medikamentoj kaj plifortigo de la merkata administrado de drogherboj, kaj tiu konsilo jam estis enskribita en dokumenton de la Ŝtata Konsilantaro pri solvo de problemoj de ĉinaj medicino kaj medikamentoj. En 1989 CK de la Asocio de Demokratia Konstruado de Ĉinio (ADKĈ) elsendis plurajn enketajn grupojn, kiuj faris duonjaran enketadon pri fakaj temoj kune kun lokaj organizoj de ADKĈ kaj prezentis konsilojn pri solvoj de kelkaj problemoj nun ekzistantaj en grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj de tutpopola posedsistemo. Post diskutado de CK de ADKĈ, ili estis prezentitaj al CK de KPC kaj la Ŝtata Konsilantaro kaj estis alte taksataj.

La praktiko pruvis, ke la polipartia kunlaboro gvidata de KPC jam enradikiĝis en Ĉinio kaj ludas ĉiam pli grandan rolon en la afero por prosperigi Ĉinion. ■

Oro- serĉantoj

SUR la Shandong-a Duoninsulo viglas la 6-a geologia taĉmento, kiu serĉas ĉefe oron. En la pasintaj pli ol 30 jaroj la taĉmento trovis por la ŝtato meznombre unu orminon grandan aŭ mezgrandan en ĉiu jaro. Inter la 6 jam kōnitaj grandegaj orminoj de la lando 5 estas trovitaj de ili. La Geologia kaj Minerala Ministerio de Ĉinio honoris la 6-an taĉmenton per titolo "Meritoplena Geologia Taĉmento".

En la tritik-rikolta sezono mi venis en la gubernion Zhaoyuan, kie estas la stabejo de la 6-a taĉmento. En nur kelkaj tagoj mi konatiĝis kun nemalmultaj prospektoroj. Forte impresis min iliaj nobla spirito, kortuŝa laboro kaj vivo.

La 53-jara supera inĝeniero Li Shixian tiam kuŝis en kvieta malsanula ĉambro de gubernia hospitalo. Vidinte min, li ellitiĝis. Tiu altastatura Shandongano malsaniĝis pro longtempa penlaboro, tamen sur lia vizaĝo ankoraŭ legiĝis facila gajeco. Lia malsano estis ekster lia atendo. Ĝuste la esplora atingo pri serĉo de Jiaoĵia-tipa ormino prezentita de li transpaŝis la tradician teorion de serĉo de ormino kaj fariĝis teoria bazo por konfirmi orminon de nova tipo en Ĉinio, tial lia atingo gajnis specialan premion de scienca esplorado en la tutlanda kunveno pri scienco kaj tekniko. Kaj li estis aprobita kiel ŝtatnivela fakulo.

Li diris al mi, ke antaŭe ĉinaj geologiaj organizoj serĉis orminon en kvarca gango laŭ tradicia teorio kaj ne atentis la strukturon de granda faŭlto. En la unuaj jaroj post la fondiĝo de la 6-a taĉmento ĉiuj multe klopodis, sed trovis malmultajn orminojn. En la meza periodo de la 60-aj jaroj la 6-a taĉmento decidis esplori la strukturon de granda faŭlto. Pli ol 20 grupoj senditaj de ĝi faris esploradon en granda areo kaj fine trovis la grandegan orminon Jiaoĵia en la granda rompita stratumo ĉe Sanshandao. Tiu-tempe oni ankoraŭ ne bone konis tian novtipan orminon kaj devis rapide fari analizon kaj resumon.



Geologoj en esplorado

Kaj la tasko falis sur s-ron Li Shixian.

S-ro Li Shixian, diplomito de la geologia fakultato de la Shandong-a Universitato, kun esplora grupo partoprenis en la peza laboro, kun sia praktika sperto. Ili vizitis ĉiujn orminejojn grandajn kaj malgrandajn de Shandong, akiris materialojn kun dek milionoj da ideogramoj, kolektis kaj analizis pli ol 60 000 specimenojn kaj donitaĵojn. S-ro Li dediĉis sian tutan energion al la afero. Foje lia edzino petis, ke li aĉetu vinagron, sed li ankoraŭ pensis sur la vojo pri la esplora programo kaj tute forgesis aĉeti vinagron. Kiam li revenis hejmen, li eĉ ne rimarkis, ke rompiĝis la botelo.

Fine en 1977 li kun siaj kolegoj plenumis disertaĵon pri la ormino de Jiaoĵia. La disertaĵo altiris la atenton de la fakuloj en la lando. Poste, sub la direktado kaj instigo de la teorio de Jiaoĵia-ormino, similaj grandaj kaj mezgrandaj orminoj estis trovitaj unu post alia.

La veteranaj geologoj de la 6-a taĉmento kun sia riĉa sperto ludas ĉefan rolon en serĉado de mino kaj junuloj en granda nombro konsistigas novan forton de la taĉmento.

Mi interparolis kun junulo, kiu revenis el alia gubernio por viziti sian familion. Li estas Rong Xuefeng. La okulvitroj kaj puraj vestoj bone sidantaj sur li vidigis lian ĝentilecon, anstataŭ la signon, ke li laboras eksterdome longtempe. Mi miris, ke li aĝas nur iom pli ol 30 jarojn, sed jam estas supera inĝeniero. Rimarkinte mian dubon, li do rakontis al mi sian travivaĵon.

En 1982 li finis la studon en altlernejo kaj eklaboris en la 6-a taĉmento. Komence li ne kontentis pri sia profesio. Ĉar li ne akomodigis al la malfacila eksterdoma labormedio, li partoprenis en ekzameno por fariĝi esplor-studento. Sed li malsukcesis. Poste li edziĝis. Estas domaĝe, ke lia edzino devas labori en Wendeng-gubernio je centoj da km. for de li. Informiĝinte pri tio, la gvidantoj de la 6-a taĉmento transpostenigis lian edzinon en la sanitarejon de la taĉmento. Rong Xuefeng, anstataŭ diri dankon, verŝis sian tutan koron sur laboron.

En la fino de 1986 li akceptis kontrakton pri iu tasko. Li elektis 4 pli-ol-20-jarajn junulojn, kaj ili plenumis laboron de 7 personoj nur per 2/3 de la investita kapitalo. En la sekvantaj du jaroj tiuj junuloj ĉiutage laboris dekelkajn horojn, transirante montojn kaj biciklante 70-80 km., kaj fine plenumis geologian mezuradon de 400 kvadrataj km. da areo kaj trovis 5-6 minojn. Ili multe superplenumis la difinitan planon kaj ricevis laŭdon de la taĉmentaj gvidantoj. Pasintjare Rong Xuefeng kun grupo da taĉmentanoj iris al Wendeng-gubernio por serĉi novan minon. Li devis refoje disiĝi de la edzino, sed ĉi-foje lia animstato estis tute alia. Li tre amis sian edzinon. Ĉiuj hejmlaboroj falis sur ŝin. Se nur li havis tempon, li senescepte vizitis sian edzinon. Mi demandis lin pri lia estonta plano, kaj li serioze diris al mi, ke li esperas trovi grandan orminon.

Lia karaktero honesta, malkaŝema kaj eltenema estas admirinda. En la 6-a taĉmento troviĝas nemalmultaj tiaj Shandong-aj viroj kaj ankaŭ tia Shandong-a virino. Ŝi nomiĝas Ren Qingyun, 36-jara, kaj laboris en la 6-a taĉmento preskaŭ 20 jarojn. Ŝi estas simpla kaj neparolema kaj ĉiutage ŝi preparis manĝaĵojn por la taĉmentanoj. Kiel kuiristino de la geologia taĉmento, ŝi renkontis multajn malfacilojn neatenditajn. La kuirejo devis translokiĝi kune kun la taĉmento. Ĉiam, kiam ili atingis novan lokon, ŝi devis tuj starigi fornon. Post tio ŝi ankoraŭ ne havis lokon por dormi kaj kuŝis ie indifere. Iafoje, pro eventuala malbona funkciado de nova forno, ŝi do preparis manĝaĵojn antaŭ la translokiĝo. Kien ŝi venis, tie ŝi lernis, tial ŝi fariĝis lerta kuiristino. En 1985 ŝi estis titolita labormodelo en la geologia kaj minerala sistemo de la lando. Por ordinara kuiristo estas malfacile akiri tian honoron. Mi gratulis ŝin, kaj ŝi honteme diris al mi: "Antaŭe, informiĝinte, ke mi devas labori kiel kuiristino, mi eĉ ploris."

La pli-ol-50-jara taĉmentestro Gan Fenglin estas

veterana geologo. La longtempa eksterdoma vivo fortikigis lin kaj brunigis lian vizaĝon. Li kaj alia gvidanto Wen Zongxing kunigis la pli ol 1 300 taĉmentanojn en kolektivon, kiu diligente laboras, povas elteni suferojn kaj sin gajigas per ludoj. Menciante la sukceson de la 6-a taĉmento, li emocie diris al mi, ke la taĉmento povas esti energioplena dum longa tempo ĉefe pro tio, ke ĝi rigardas homojn kiel gravan faktoron. Se nur ĝi vere zorgas pri siaj anoj kaj solvas por ili malfacilojn en la vivo, ĉi tiuj povas esti devokonsciaj por sia laboro. En ia lastaj jaroj la gvidantoj de la 6-a taĉmento faris jenajn aferojn: unue, ili ĉiamaniere kolektis kapitalon kaj konstruis 4 vicojn da loĝdomoj, tiel ke multaj taĉmentanoj translokiĝis en novan domon; due, ili garnis pli ol 20 ĉambrojn en la laborloko per libroj, televidiloj kaj sportiloj por riĉigi la postlaboran vivon de la taĉmentanoj; kaj trie, ili solvis la problemon de iuj geedzoj, kiuj vivis malproksime unu de la alia, tiel ke multaj fakuloj retiris sian intencon parlasi la taĉmenton.

Malgraŭ tio, la nunaj vivkondiĉoj de la taĉmentanoj ankoraŭ estas nebonaj, tamen ili senĉese serĉas orminon kiel antaŭe. ■


ABONTARIFO DE EPĈ POR 1991

Lando	Valuto	1 jaro	2 jaroj	3 jaroj
Aŭstralio	AUD	16.00	26.00	36.00
Aŭstrio	ATS	215	360	500
Belgio	BEF	620	1020	1400
Germanio	DEM	32.00	54.00	76.00
Britio	GBP	9.50	15.00	21.00
Finnlando	FIM	72.00	117.00	163.00
Francio	FRF	102.00	165.00	225.00
Hispanio	ESP	1550	2500	3500
Italio	ITL	20600	33500	46500
Japanio	JPY	3000	5400	7500
Nederlando	NLG	35.50	61.00	85.00
Nov-Zelando	NZD	21.70	36.00	50.00
Portugaliao	PTE	1550	2500	3500
Svisio	CHF	26.80	44.00	64.00
Usono	USD	15.50	26.00	36.00
Kanado	CAD	15.00	25.00	35.00
Por aliaj landoj en Eŭropo:				
	USD	11.50	18.50	26.00
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:				
	USD	7.80	12.50	17.50



Sceno el "Ĉe la Flava Rivero"

"Patrino kaj filo"



Arto enra- dikiĝinta en flava tero

Teksto de DA WEI

Fotoj de YAN JIN



“Post edziniĝo”

KIAM la scenejo iom post iom lumiĝis, en ĝia profundo aperis vico da siluetoj, kiuj levis la ŝultrojn, kurbigis la talion, kliniĝis malantaŭen, elstarigis la postajon kaj staris sur la piedfingroj akompanate de klara ritma muziko, ŝanĝis sian pozon kaj prezentis reliefajn bildojn unu post alia.

Tio estas la komenco de la nacia danco “Ĉe la Flava Rivero” kreita de la Shanxi-a Kant-danca Ensemblo. La danco el 9 partoj prenis la lokan geedziĝan moron kiel la ĉefan enhavon por priskribi la virinan vivon en la baseno de la Flava Rivero. La 9 partoj estas “Antaŭ edziniĝo”, “Novedzo dorse portas novedzinon trans la riveron”, “Geedziĝo en sonĝo”, “Svatado”, “En geedziĝa ĉambro”, “Novedzino kun edzo vizitas siajn gepatrojn”, “Deziro pri filo”, “Amo inter patrino kaj filo” kaj “Post edziniĝo”.

Jam en 1987 la Shanxi-a Kant-danca Ensemblo altiris la atenton de multaj homoj per la popola kant-danco “Gefiloj de la Flava Rivero”, kiu estis prezentita 300 fojojn kaj ĝis nun ankoraŭ estas tre bonvena. La ĉinaj artistoj nomis la dancon debuta verko de la kant-danca arto de la skolo de la Flava Rivero. En la Ĉina Arta Festivalo en 1990 la menciitaj kantodancoj de Shanxi estis plej ŝatataj de spektantoj kaj fakuloj kaj gajnis la premion de tiu festivalo.

Dum mia vizito al Shanxi mi ĝuis prezentadon de la ensemblo kaj konatiĝis kun iuj koreografoj kaj aktoroj. Koreografoj Wang Xiufang, Yue Lijuan kaj Feng Yumei estas mezaĝaj talentulinoj. Kvankam sulkiĝis iliaj fruntoj, tamen tio ne ŝanĝis ilian belan staturon. Sendube, en la juneco ili estis elstaraj dancistinoj.

“Via danco estas tre ĉarma,” mi laŭdis.

“Eĉ ni estis ravitaj kaj ĉiutage pensis pri danco, tamen nia danco ne estis senbaze kreita,” ili diris.

Fakte, sen persona spertado de la kampara vivo en multaj jaroj, sen profunda amo al la popolo de la Leŭsa Altebenaĵo, ili neniel povus krei la dancon. En la pasintaj jaroj ili kreis iujn furorajn verkojn seninflujajn kaj senvivajn. La sukceso de “Gefiloj de la Flava Rivero” komprenigis al ili, ke la elirejo de la Shanxi-aj kantoj kaj dancoj ja estas sur la flava tero sub iliaj piedoj.

La flava tero rememorigis al ili multon: “Ĉiujare en la 50-60-aj jaroj la ensemblo iris al kamparo por fari prezentadon kaj vivi, labori kaj amuziĝi kune kun kamparanoj, tiel en ilia kapo restis tre amindaj figuroj de Shanxi-aj kamparanoj. Wang Xiufang rakontis sian travivaĵon en Xijang-gubernio en 1964. Tiam ŝi logis en familio el maljuna geedza paro. La mastrino estis entuziasma, bonkora kaj babilema.

Kiam ŝi estis libera, ŝi babilis kun aktoroj; dum la mastro estis silen-tema. Ĉiumatene li iris al kampo kaj revenis ĉe sunsubiro. Iafoje li povis diri: "Kie estas Xiufang? Ĉu ŝi havas bonan apetiton?" Post kiam ŝi revenis en la provincan ĉefurbon, ŝi informiĝis, ke en la tago, kiam ŝi forlasis ilin, la mastro ne iris al kampo, ne manĝis nek trinkis, sed nur fumis en la korto kaj gape rigardis la pordon de la korto. Post nelonge ŝi ricevis pake-ton, senditan de li, kun maizpanoj kaj kukurbosemoj tre ŝatataj de ŝi. Ŝi emociiĝis kaj ne povis deteni sin de larmoj.

Eble simpleco, honesteco kaj mizero estas karakteroj de la flava tero. El tio la koreografoj komprenis ion! Sekve ili estis forte inspiritaj al komponado kaj aperigis la dancon "Ĉe la Flava Rivero". Kompreneble, vivo ne estas sama kiel scenejo. En komponado ili tre atentis la temperamentojn, karakterojn kaj sentojn de la roloj por krei taŭgajn dancmovojn kaj surbaze de Shanxi-aj popoldancoj enkondukis la arton de la modernaj baletoj, roko k.a. Tio ne nur kontentigis la postulon de la nuntempaj spektantoj, sed ankaŭ havigis fortan stilon de la loka arto kaj rikoltis bonan efikon.

Sendube, la intenco de la koreografoj povas esti plenumita nur per la aktoroj. Geedzoj Song Lacheng

Koreografoj kaj aktoroj



provludo

kaj Jia Xiaoping, elstaraj aktoroj, malkaŝe diris: "Ni timis, ke la koreografoj venos por direkti nian provludon. En la okuloj de iuj homoj dancado estas leĝera kaj romantika profesio. Sed nia penlaboro antaŭ prezentado absolute ne estas malpli peza ol tiu de transportistoj." Song diris al mi, ke la duontaga fortokonsumo por ekzerciĝi en surŝultra turniĝado egalas al tiu por ŝarĝi unu varvagonon.

"La levita aktorino frotvundis

al li la ŝultrojn kaj nukon," Jia Xiaoping kompatis sian edzon. "Por bone ludi la rolojn iam ni devis fari rekreadon. En 'Gefiloj de la Flava Rivero' estas sceno, kiu priskribas stultan knabinon gapan-tan al *jangge*-danco. La koreografoj ordonis, ke mi ludu la rolon de la stulta knabino. Reveninte hejmen, mi gestadis antaŭ spegulo kaj ekpensis, ke en la infaneco mi starante spektis vilaĝan teatraĵon kaj, kiam kulminis la sceno, mi rondi-

gis la okulojn kaj forgesis la ĉirkaŭajn spektantojn. Mi lernis el tio. Per interne dispietada staro mi prezentis la stulton de la ekzaltita knabino. Tio ricevis laŭdon de la koreografoj kaj spektantoj.

S-ro Long Yunfei, direktoro de la ensemblo, kun kontenta mieno konigis al mi, ke la dancon kreis la kolektivo. Inter la kreintoj estas Shanxi-anoj kaj aliprovincanoj, kiel muzika komponisto Zhang Wenxiu kaj koregrafino Wang Xiu-



“Deziro pri filo”

“Antaŭ edziniĝo”



fang. Ili ĉiuj enradikiĝis en la flava tero en Shanxi kaj prenis grandan kvanton da kvin-tesenco de la popola kulturo, muziko kaj danco, tiel ke ili verkis la tekston, komponis la muzikon kaj kreis la dancon kun granda infekta povo.

S-ro Lu Keyi, artisto kaj vicestro de la Kultura Departemento de Shanxi, indas je la nomo de la ĉefdirektanto de arto de la du kant-dancoj. Li resume parolis en la Shanxi-a dialekto pri artaj karakteroj: Kombino de nacia stilo, loka gusto kaj epoka trajto, kaj un-



"Geedziĝo en songo"

"Novedzino kun edzo vizitas siajn gepatrojn"

Foto de DA WEI



ueco de apreco kaj arto estas la artaj karakteroj de la skolo de la Flava Rivero. Ĝuste tio estas vojo serĉata de la Shanxi-a Kant-danca Ensemblo dum dekoj da jaroj.

Oni diras, ke unu rivero prezentas unu kulturon. La Flava Rivero nutras la ĉinan nacion kaj sian kulturon. Ĝi restigis al Shanxi pli ol 30 000 popolkantojn kaj 200 popol-dancojn. S-ro Lu Keyi daŭrigis, ke se nur oni diligente laboras sur la flava tero, aĉeros pli da kantoj kaj dancoj en gusto de la flava tero. ■

Karakterizado de la diablo per proverboj

Laŭtema traktado de proverboj

La publikigo de esperantigitaj versioj de etnolingvaj proverboj estas ŝatata okupo de homoj interesiĝantaj pri la popolliteraturo kaj la folkloro. Jam en la jaro 1888, d-ro Zamenhof plenigis duonpaĝon en la *Dua Libro* (pĝ. 47) per "popoldiroj", kaj poste li kompilis tutan libron, la faman *Proverbaro Esperanta*, kiu estas Esperanta versio de la kolekto da proverboj kaj esprimoj publikigitaj de lia patro Marko Zamenhof. La valoron de la uzado de proverboj Zamenhof koncize reliefigas en jena ekzemplo: "Proverbo estas sperto, proverbo estas averto."

Ĝenerale la aroj da proverboj aperantaj en Esperantaj periodaĵoj kaj libroj tuŝas plej diversajn aferojn sen iu komuna ligo inter si. En antaŭe publikigitaj artikoloj pri proverboj mi provis grupigi ilin sub gvida temo, kaj interne de tiu klasifo, mi aranĝis la proverbojn laŭ specifaj signifoj. Tiu metodo montras en tre evidenta maniero, kiel similaj observoj pri homoj kaj la mondo povas esti diversmaniere esprimitaj. Valoras kompari ankaŭ la proverbvariaĵojn pro la nuancado de konceptoj. Plej okulfrapaj estas proverboj esprimantaj kontraŭdirajn nociojn; ili instigas legantojn demandi, kiun vojon al saĝeco oni sekvu, kie vere troviĝas la vero, kaj ĉu pravas la proverbo "ĉiu medalo du flankojn posedas".

En tiu ĉi artikolo mi ilustras la laŭteman metodon per pritrakto de la diablo, liaj personaj trajtoj kaj liaj agadoj. Mi ĉerpis ekzemplojn el jenaj fontoj: *Proverbaro Esperanto* de Zamenhof, etnolingvaj kaj Esperantaj frazeologioj, etno-

lingvaj kolektoj da proverboj, kaj diversaj vortaroj. En miaj tradukoj de la etnolingvaj versioj, mi provis sekvi la stilon, kiun Zamenhof mem uzis. Kelkloke mi elpensis originalajn proverbojn, kiujn mi bezonis por praktikaj frazeologiaj celoj. Proverboj signitaj per la litero "Z" kaj numero troviĝas en *Proverbaro Esperanta*.

1. La diablo estas ĉie proksima kaj ĉiam preta agi

- a. La diablo neniam estas malproksima.
- b. La diablo ne dormas.
- c. Eĉ kiam la diablo ronkas, li ne dormas.
- ĉ. Diablo ne ĉiam unu pardon sieĝas (Z 333).
- d. Kiam la diablo ne povas veni, li sendos.
- e. Kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas (Z 870).

1.1. La diablo ne timas embuski eĉ proksime al religiuloj kaj sakralaj lokoj.

- a. Ĉirkaŭ sanktuloj diabloj vagas (Z 238).
- b. Malantaŭ la kruco staras la diablo.
- c. Kie Dio havas sian preĝejon, la diablo havos sian kapelon.

2. Estas danĝere priskribi la diablon, ĉu bilde ĉu vorte

- a. Ne pentru diablon sur la muro (Z 1722).
- b. Ne voku diablon, ĉar li povas aperi (Z 1765).
- c. Oni ne devas dufoje voki la diablon.
- ĉ. Diablo ŝercon ne komprenas, vokite li venas (Z 334).
- d. Ne rakontu pri l' diablo eĉ en

fablo (originala).

3. La diablo havas bonajn, eĉ homajn trajtojn

- a. La diablo ne estas tiel nigra, kia oni ĝin pentras.
- b. La diablo kelkfoje diras la veron.
- c. La diablo estis bela, kiam li estis juna.
- ĉ. Ankaŭ diablo tondron suferos (Z 95).
- d. Ankaŭ por diablo tondro ekzistas (Z 95).
- e. Ankaŭ la diablo trankviligiĝis, kiam li falis de sur la arbo.
- f. Ankaŭ la diablo enuas, sidante sur tergibo.
- g. Ankaŭ la diablo estus bona, se li ne estus obstina.

3.1. La diablo ne estas bonigebla

- a. Estas malfacile kalki la diablon.
- b. Iam diablo, ĉiam diablo.
- c. Eĉ la diablo ne povas kaŝi sian fendohavan hufon.
- ĉ. Disrompu la diablon, lasu lin foriri; ĉiam li restas diablo.
- d. Multaj diabloj ne valoras eĉ unu anĝelon.

4. Oportuneco kaj hipokriteco de la diablo

- a. En tempo de bezono la diablo manĝas muŝojn.
- b. La diablo povas citi la Bibliion por siaj celoj.
- c. Kiam la diablo maljuniĝas, ermito li fariĝas.
- ĉ. Kiam la diablo estis malsana, monako volis esti li; kiam la diablo estis sana, diabla monako estis li.
- d. Kie neniu volas porti la krucon, tiam la diablo devas fari tion. (Sed jenaj du proverboj aludas malbonajn sekvojn.)

e. Estas malbona procesio, kiam la diablo portas la krucon.

f. Estas malbona batalo, kiam la diablo portas la standardon.

5. La homo kiel diablo

a. Esti anĝelo inter homoj, sed satano en la domo (Z537).

b. Sanktulino ekstere kaj diablino enhejme.

c. Vizaĝo agrabla kaj ungo diabla (Z 2606).

ĉ. Inter fremdaj ŝi estas edzino-anĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela (Z 760).

d. Tute sankta ekstere, tute diabla interne.

e. Juna sanktulo antaŭas al maljuna diablo.

f. La kruco sur la brusto kaj la diablo en la koro.

g. La rozario en la mano kaj la diablo en la kapuĉo.

ĝ. En buŝo Biblio, en koro malpio (Z 483).

h. Kuracisto estas anĝelo ĉe konsultado sed diablo okaze de pagado.

5.1. Virinoj kaj la diablo

a. Malbona virino diablone superas (Z 1425).

b. Viro, virino kaj diablo estas la tri gradoj de komparacio.

c. Virino estas tindro, viro estas fajro; la diablo venas funkciigi la balgoblovilon.

Konkludo

La proverboj inkluditaj en la ĉi-supraj kategorioj pritraktas kelkajn aspektojn de la karaktero de la diablo. Ankoraŭ restas en mia kolekto dekoj da proverboj temantaj pri interrilatoj de homoj kaj la diablo en diversaj situacioj.

Grava limiga faktoro en la kolektado de la proverboj estas la uzo de fontoj el nur okcidenteŭropaj lingvoj kaj kulturoj. Estus tre utile entrepreni esplorprojekton pri samtemaj proverboj el aliaj partoj de la mondo por ekscii, kiuj nocioj estas universalaj kaj kiuj estas ligitaj al specifaj kulturoj. ■

* S-ro Bernard Golden estas membro de Akademio de Esperanto kaj FD (arkeologio, esperantologio kaj interlingvistiko) en Veszprem, Hungario.

TRA LA MONDO

Fronger-parko de skulptitaj statuoj en Oslo

FRONGER estas fama parko de skulptitaj statuoj en Oslo, la ĉefurbo de Norvegio.

Tie la statuoj dislokiĝas en 150 grupoj, kiuj dividiĝas en 3 partojn. La unua parto kun longa ponto kiel sia centro konsistas el skulptitaj statuoj dislokitaj ĉe la balustradoj de la ponto kaj sur placoj ambaŭflanke de ĝi. La statuoj plejparte estas faritaj el kupro. Pro longa tempo ili estas verdigraj. La dua parto estas fontano. En la centro pluraj skulptitaj homoj kune tenas alte grandan pleton, el kiu disŝprucas akvo, kiu falas en cisternon. Ĉe la kvar anguloj de la cisterno staras po 5 grupoj da skulptitaj statuoj kaj dislokiĝas multe da malgrandaj reliefoj sur parapetoj, ĉiu montras unu historion. Por pririgardi ilin oni bezonas duontagon. La tria parto, la plej bona parto de la parko, konsistas el blankaj statuoj el granito, kiuj orde viciĝas en formo de alta teraso. Meze de ĝi kolono 17 m alta superstaras la tutan parkon. La kolono plenas de homfiguroj — 121 viroj kaj virinoj, junaj kaj maljunaj. La kolono, kiel aliaj artaĵoj en la parko, ne portas nomon. Iuj opinias, ke ĝi montras, ke la malnova generacio mortas kaj la nova kreskas, kaj nomas ĝin “vivko-

lono”; aliaj diras, ke la artisto celis esprimi la kontraŭmilitan penson: “por la venko multaj mortis”, t.e. la gloron starigis senombraj viktimoj.



La skulptitaj statuoj en Fronger-parko estas nudaj senescepte inkl. de novnaskitoj kaj maljunuloj, homoj belaj kaj malbelaj. Tie vidiĝas skulptita infano piedbatanta kaj ploranta kun fermitaj okuloj kaj malfermita buŝo. Ĝin aprecante, oni kvazaŭ aŭdas la ploradon. La artisto ne ĉasis la perfektecon de siaj verkoj, sed dediĉis grandan atenton al vivdetaloj, tiel ke la mienoj kaj pozoj de la skulptitaj figuroj estas diversaj, pluraj el la artaĵoj estas glataj pro mankarsado de turistoj. Kiom oni amas ilin! En la plej malproksima loko de la parko estas cirklo konsistanta el skulptitaj homfiguroj, kio simbolas la vivon cirkulantan. Ke la vivo senĉese daŭras de naskiĝo, maljuniĝo, malsaniĝo ĝis morto, tio kredeble estas la temo de la skulptaĵoj de la parko.


Ĉiuj skulptitaj statuoj en la parko estis faritaj sole de majstro Gustav Vigeland. En la aĝo de 34 jaroj li ekdediĉis sian tutan energion al la skulptado kaj plenumis la laboron por tiu ĉi giganta senmorta subĉiela eksponejo en la aĝo de 75 jaroj. ■



Kupraj skulptaĵoj sur balustradoj

Statuoj de forta viro kaj infanoj





Kolono kun 121 nudaj homfiguroj



Ŝtonaj skulptaĵoj en la parko

Subĉiela eksponejo



LI QIANG:

Antikvaj astronomiaj instrumentoj sur Zijin-monto

LA impona Zijin-monto en la orienta antaŭurbo de Nankino estas abunda je verdaj arboj. Tie ĉiam brilas purpuraj skistoj en la suno. Inter la verdaj arboj viciĝas en bona ordo argentaj kupoloj. Jen la si-

dejo de la Nankina Observatorio sur Zijin-monto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj.

Antaŭ nelonge mi vizitis tiun ĉi grandan modernan observatorion. Mi ne longe restis antaŭ la gigantaj teleskopoj por observi la

misteran steloplanan ĉielon, nek vizitis mondfamajn astronomojn por koni la astroidojn trovitajn de ili kaj nomatajn per ĉinaj loknomoj. Min interesis kaj mirigis la antikvaj bronzaĵaj astronomiaj instrumentoj, kies verdigro kondukis min al malproksima antik-

SUR NIA LIBROBRETO

Ĝuo por la okuloj

de G. F. MAKKINK (Nederlando)

KURIOZAJ FLOROJ KAJ ARBOJ en la provinco Yunnan, Ĉinio. Zhang Qitai, Feng Zhizhou kaj Yang Zenghong. El la ĉina trad. Seimin. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1988. 146p. 27cm. Bind. Prezo: 45.00 gld.

Ĉi tiu libro enhavas 1 mapon de la regiono kaj 131 paĝojn de belegaj kolorfotoj sur nigra fono,

plejmulte tutpaĝaj. Ili bildigas pejzaĝojn, vegetaĵarojn, arbojn, florantajn plantojn, kaj estas ĝuo por la okuloj kaj interesaj por naturamantoj. La teksto ampleksas nur 6.5 paĝojn entute; ĝi priskribas la pejzaĝon, maloftajn plantojn, utilajn kaj dekoraciajn vegetalojn, donante interesajn informojn.



La lingvo estas bona (escepte unu frazon: besto trafas sagon, p. 26), eĉ tro bona, ĉar multaj legontoj devos plurfoje uzi PIV-on por trovi la signifon de maloftaj vortoj (ekz. apika, acerba, refraktara, dokta, punca), evitindaj por teni Esperanton simpla.

La uzo de la sciencaj (latin- kaj grekdevenaj) nomoj vekas nenian

veco.

Ĉinio estas unu el la landoj, kies astronomio evoluis plej frue. Jam antaŭ miloj da jaroj antikvaj ĉinoj konis multajn astronomiajn fenomenojn. Dank' al la disvolviĝo de produktado kaj scienco, oni inventis astronomiajn instrumentojn kaj iom post iom kompletigis ilin. *Gujbjaŭ-o* estas unu el la plej antikvaj kaj plej simplaj astronomiaj instrumentoj de Ĉinio. Ĝi konsistas el longa stara longa gnomono (*bjaŭ-o*) kaj ciferplato (*guj-o*). Laŭ la ombrolongo de la gnomono sur la ciferplato en la tagmezo, oni povis elkalkuli la 24 sunperiodojn de jaro. Laŭ la periodo de la ŝanĝiĝo de la gnomona ombro oni povis certigi la tagojn de la tropika jaro. Mi iam vidis la plej antikvan *gujbjaŭ-on* en la observatorio de Dengfeng, Henan-provinco, kiu aĝas 3 000 jarojn. Post Han-dinastio (206 a.k. — 220 p.K.) ĉina *gujbjaŭ-o*

dubon pri ĝusteco; pri la uzo de la Esperantaj nomoj oni estu indulga, ĉar ja estas grandega laboro krei harmonian nomaron por la flaŭro de Yunnan. Kelkaj problemoj: foje la tradukinto uzis por specio la duan, specian nomon (same kiel faris Zamenhof kreante la nomon *frugilego* por speco de korvedo). Tiaj nomoj devenas de adjektivoj, kiuj povas aplikigi al aliaj organismoj: retikularo, makrokarmo, poli-filo, fusko ktp. Tiuj ne taŭgas. Aliaj Esperantaj nomoj estas transskriboj de la scienca genra nomo (Parido, Eŭkomio, Miĉelio, Kodariokaliko ktp). Tiaj nomoj nur parte taŭgas, ĉar ili bezonas aldonan specian nomon. Estos tasko por postaj botanikistoj doni definitivajn nomojn en Esperanto.

La kvalito de la fotoj de la ses fotistoj estas ĝenerale tre alta. Ili donas konvinkan pruvon de la botanika riĉeco kaj graveco de la flaŭro de Yunnan. ■

ne plu estis ŝtona, sed bronza. La gnomono estas ĉ. 2.64 m. alta kaj ciferplato 4.33 m. longa. En Qing-dinastio (1644-1911) oni altigis la gnomonon je 3.3 m. Pro tio la ombro de la gnomono ĵetiĝis ekster la ciferplaton en vintro kaj sekve oni ne povis fari mezuradon. Tial oni starigis gnomonon ĉ. 1.16 m. altan en la alia fino de la ciferplato, kiu estas plilongigita parto de la ciferplato. Ĝi nomiĝas stara ciferplato. Mezurinte la alton de la gnomona ombro sur ĝi, oni povas elkalkuli la longon de la ombro de la gnomono 3.3 m. alta. Tiu ĉi delikata bronza *gujbjaŭ-o* staras sur Zijin-monto. Ĉiutage ĝi montras la longon de la gnomona ombro.


La plej delikata antikva astronomia instrumento sur Zijin-monto estas ringa sfero. Ĝi, el 7 grandaj bronza ringoj subtenataj de 4 bluaj drakoj, estas ne nur astronomia observilo, sed ankaŭ bronza metiartaĵo. Laŭ la ekvatora koordinat-sistemo ĝi mezuras la sidejon de fiksa stelo kaj la moviĝon de la suno, luno kaj planedoj. Tiu ĉi koordinat-sistemo estas uzata pli frue je 1 000 jaroj ol tiu en la Okcidento. Pro multeco de la ringoj ĝin manipuli estis malfacile, tial kiam oni povis precize interŝanĝi kelkajn sistemojn, oni komencis ĝin simpligi. Guo Shoujing (1231-1316), astronomo de Yuan-dinastio, faris simplan sferon por inventi novan kalendaron. La simpla sfero laborigis sendepende horizontalan teodoliton, ekvatoran teodoliton kaj gnomonon, tiel ke la instrumento aplikigis en pli vasta kampo kaj observado fariĝis pli preciza. Ĝi estis la plej bona astronomia instrumento en sia tempo kaj la origino de la konstruo de la moderna astronomia instrumento. La simpla sfero farita de Guo jam perdiĝis. La nun vidataj simpla kaj ringa sferoj estis faritaj en 1437, kiam regis Ming-dinastio.

Nun sur Zijin-monto konserviĝas horizontala teodolito kaj malgranda globuso faritaj fine de Qing-dinastio. La formo, ornamo kaj teknologio de tiuj delikate skulptitaj instrumentoj portas tradiciajn trajtojn de Ĉinio, dum la gradoj, verniero kaj strukturo spegulas la progreson de la grandaj astronomiaj instrumentoj post la Renesanco. Ili estas atesto de la kultura interŝanĝo inter la Oriento kaj Okcidento.

Tiuj ĉi antikvaj instrumentoj spertis grandajn danĝerojn. Antaŭe ili estis lokitaj en la Antikva Observatorio de Pekino kaj alte taksataj de la sciencistaj rondoj de la tuta mondo. En 1900 la Okpotenca Alianca Armeo sin trudis en Pekinon kaj detruis kaj rabis riĉaĵojn de Ĉinio. Ankaŭ tiuj astronomiaj instrumentoj ne povis eviti la katastrofon. La simpla sfero kaj horizontala teodolito estis arbitre translokitaj en la ambasadorejon de Francio. Ili estis redonitaj al Ĉinio en 1902. La ringa sfero kaj globuso estis transportitaj en Berlinon kaj revenis al Ĉinio en 1921. En la 30-aj jaroj ĉinaj sciencistoj transportis ilin sur Zijin-monton.


La antikvaj astronomiaj instrumentoj estas multe protektataj de la ŝtato kaj popolo de post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Oni plurfoje riparas kaj eksponis ilin. En la lastaj jaroj arkeologoj de la Nankina Muzeo refoje riparas ilin, tiel ke la verdigraj instrumentoj denove ekfunkciis. Nun oni povas fari astronomian observadon kaj senpere koni la antikvan ĉinan astronomion, aplikante ilin.

Antaŭe tie staris alia globuso. En 1953 prezidanto Mao Zedong pririgardis ĝin kaj instrukciis, ke oni bone protektu ĝin. Bedaŭrinde, ĉi-foje mi ne vidis ĝin. Oni diris al mi, ke ĝi estas riparata en la Nankina Muzeo. Mi deziras, ke ĝi reprenu sian formon kaj bone laboru kiel antaŭe. ■




La ringa sfero

La simpla sfero




La Astronomia Observatorio sur Zijin-
monto





Tibetaj riparistinoj de ŝoseo



Aŭtovoja ponto en Kunlun-montaro

Vojaĝo en Tibeto (II)

Tesкто kaj fotoj de LI QIANG

Ĉe aŭtoservejo

Foto de YU XIANGJUN



MULTAJ eksterlandanoj diris, ke Tibeto de Ĉinio estas mistera loko. Efektive, ĝi estas mistera ankaŭ por multaj ĉinoj. Mi ja deziris iutage viziti tiun misteran teron kaj propraokule rigardi la kutimojn kaj morojn de tibetanoj kaj ĝui la pejzaĝojn sur la monda tegmento. Finfine mia deziro realiĝis en aŭgusto de 1990. En unu monato mi vizitis sinsekve Lhasa, Xigaze, Nagqu, Gyangze, Lhaze, Nyalam kaj aliajn lokojn. Mi vizitis ankaŭ la montpasejon Naiduila limtuŝantan Sikimon kaj Zhangmu, limtuŝantan Nepalon. Mi prezentos al vi, niaj karaj legantoj, mian vojaĝon en Tibeto per kelkaj artikoloj.

MALFACILA KAJ ALLOGA VOJO

Du vojoj kondukas al Tibeto. Veturinte per aviadilo de Pekino al Chengdu, Sichuan-provinco, oni flugas per alia aviadilo kaj atingas post 2 horoj Lhasa, la ĉefurbon de la Tibeta Aŭtonoma Regiono, tio estas sekura kaj oportuna aervojo. Sed mi preferis la alian, malfacilan vojon: aŭte iri al Lhasa laŭ la Qinghai-Tibeta Ŝoseo.

Mi dufoje veturis sur la pli ol 1 900-kilometra Qinghai-Tibeta Ŝoseo inter Xining, la ĉefurbo de Qinghai-provinco kaj Lhasa. Sed la plej fora loko por mia vojaĝo estis Golmud, nova urbo sur altebenaĵo. Ĉi-foje, mi veturis de Golmud plu suden, transpasinte Kunlun-montaron, Tuotuo-riveron, Tanggula-montaron, Nyanqentanglha-montaron kaj fine mi atingis Lhasa.

La 1 130-kilometra ŝoseo de Golmud ĝis Lhasa sin etendas sur la altebenaĵo meznombro pli ol 4 000 m. alta super la marnivelo. Ĝi estas la plej alta ŝoseo en la mondo. Survoje la imponaj kaj mirindaj pejzaĝoj donis al mi neforgeseblan impreson. Montpintoj de la majesta Kunlun-montaro estas kovritaj de blanka neĝo kaj



Trafiko sur la Qinghai-Tibeta Ŝoseo

grandiozaj glacifluoj etendiĝas de montkresko al montpiedo. Ĉe la montpiedo verdas grasaj herboj kaj de tempo al tempo vidiĝas paŝtistoj kun gregoj da ŝafoj. Ĉie regas kvieto kaj paco. La kruta Nyanqentanglha-montaro karesata de la subiranta suno aspektas ĉarme kaj varieme. Ĝi estas vere impona kaj bela.


Kvankam la pejzaĝoj estas allogaj, tamen tie oni suferas de malvarmo kaj oksigeno-manko. Veturante en montpasejo de Tanggula-montaro, la plej alta parto de la Qinghai-Tibeta Ŝoseo, oni sentas sin malforta eĉ en aŭtobuso. Iuj pasaĝeroj somnolis pro kapturigo kaj aliaj senĉese vomis. Mi surmetis ĉiujn vestojn kunportitajn de mi, kaj ankoraŭ sentis min malvarma, atakate de la frostata vento tra la busaj fenestroj. Sciu, ke tiam estis somero!

Antaŭ la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949, en Tibeto troviĝis neniu ŝoseo. Oni piediris aŭ ĉevalrajdis al Lhasa de Sichuan-provinco aŭ Qinghai-provinco, tio bezonis 3-4 monatojn. Post la Paca Liberigo de Tibeto en 1951, sinsekve komenciĝis la konstruado de Sichuan-Tibeta kaj Qinghai-Tibeta Ŝoseoj kaj ili ambaŭ estis transdonitaj al trafiko en la 25-a de decembro 1954. De tiam, kom-

plete ŝanĝiĝis la trafika kondiĉo de Tibeto. Kornicoj, padoj, eskaloj, kablopontoj kaj unutrabaj pontetoj cedis sian lokon al la ŝoseoj.

Laŭ la informo de koncerna departemento, ĉiujare 85% de la varoj entibetigitaj kaj 90% de la eltibetigitaj estas transportataj sur la Qinghai-Tibeta Ŝoseo, kiu funkcias ne nur kiel la grava trafika arterio inter la landinterno kaj Tibeto, sed ankaŭ kiel la vivlinio de la tibeta disvolviĝo. Por garantii glatan funkciadon de la ŝoseo, laboras sur la ŝoseo multaj aŭtovojistoj, eĉ en la montpasejo de Tanggula-montaro vidiĝis sporadaj loĝdomoj de aŭtovojistoj. Kiam nia aŭtobuso atingis la pasejon, la laboristoj estis okupitaj je voj-riparado. Mi rimarkis, ke nia ŝoforo, veturante antaŭ ilin, bremsis la aŭton kaj speciale fajfis por ilin saluti. Bedaŭrinde, mi ne elbusiĝis por babilo kun ili, eĉ ne klare vidis ilian vizaĝon.

Transpasinte la montpasejon de Tanggula-montaro, ni eniris en Tibeton. Ambaŭflanke de la ŝoseo etendiĝas vasta alpa ebenaĵo sen loĝdomoj kaj kortbrutoj kaj nur de tempo al tempo vidiĝis laĝetoj, sovaĝaj azenoj kaj ĉamoj, eĉ saltantaj leporoj vekis nian krion. Enirinte en Tibeton, ni unue atin-



La monumento ĉe la komenco de la Qinghai-Tibeta Ŝoseo

gis la vilaĝon Anduo, kie kune loĝas tibetanoj kaj kie antaŭ ni montriĝis la paŝtejo de la nordtibeta stepo. Dank' al la malaltiĝinta topografio, la loko abundas je akvo kaj herboj. Gregoj da ŝafoj

antaŭ la blankaj tegmentoj, mi vidis rapide turniĝantajn en vento alojn de la hejmaj ventenergiaj generatoroj. Profitante de ventego, oni ŝanĝis sian malnovan kutimon kaj ne plu hejtis per bovaj fekaĵoj.

kaj bovoj paŝtigis sur herbejo. Ja v i v p l e n a mondo tie estis.

Nagqu estas grava loko sur la nordtibeta stepo. Kiam nia aŭtobuso haltis tie, mi estis allogita de argente brilantaj tegmentoj. Demandinte, mi informiĝis, ke en Nagqu trionon de la jaro blovas 8-grada ventego, por defendi la tegmenton kontraŭ la ventego, oni firmigis ĝin per galvanizita lado. An-

Tie oni parolis multe pri la terura neĝostormo ĵus pasinta. Iu maljuna paŝtisto diris al mi, ke li neniam travivis tiel longtempan neĝostormon, kiu daŭris de septembro 1989 ĝis aprilo 1990. Laŭ historiaj notoj, dum la lasta jarcento terura katastrofo de neĝostormo kelkcent-foje atakis la nordan Tibeton, plagante la brutojn, pereigante la paŝtistajn familiojn kaj devigante la postvivantojn forlasi sian hejmlokon. La lasta neĝostormo ja dronigis en malfacilan situacion pli ol 220 mil loĝantojn, 5 milionojn da bovoj kaj ŝafoj sur la Nagqu-tero de 240 mil kvadrataj kilometroj.

Sed ĝuste kiam Nagqu dronis en danĝero, la centra registaro de Ĉinio sendis aerfloton al Nagqu por paraŝutigi 1 575 tunojn da nutraĵoj, vestoj kaj hejtaĵoj. Dank' al tio, neniu mortis de malsato kaj malvarmo aŭ migris aliloken por almozpeti. Tiam 4 milionoj da brutoj postvivis la katastrofon. Starante sur la Nagqu-tero kun grasaj herboj kaj aroj da bovoj kaj ŝafoj, mi ne kredus, ke antaŭ nur 4 monatoj tie okazis terura katastrofo, se tion oni ne rakontus al mi.

Post longa vojaĝo, aperis antaŭ mi Potala-palaco sur la altebenaĵo, al kiu mi sopiris de longe. Finfine, mi atingis Lhasa. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Nadejda Meteljova, 27-j. ofiĉistino, dez. kor. kun esperantistoj el Ĉinio, Pakistano, Hindio pri ĉt. Respondo garantiata. Adr.: 610021 u. Kirov, Str. Vorovskogo, d 102 - 144, Sovetunio.

* Antonio Carlos Rodrigues

dez. kor. tm. pri amo kaj sekso. Certe respondas. Adr.: Caixa Postal 842, 09001 Sto Andre SP, Brazilo.

* Zbigniew Wojcik dez. kor. tm. pri orientaj religioj, kulturoj, kreskaĵoj kaj popola medicino. Adr.: PL-56-400 Olesnica, ul. 15 Grudnia 5 B/2, Pollando.

* Diversaĝaj (18-60j.) junaj esperantistoj de E-klubo "Murmano" volonte korespondas kun ĉinaj kaj alilandaj samideanoj pri ĉt. Adr.: p.k. 4714, Murmansk, 183050 Sovetunio.

* Dovile Krupickaite, 20-j. stu-

dentino, dez. kor. tm., interesiĝas pri ĉinstila pentraĵo kaj floroj. Adr.: Lithuania-232049 Vilnius, Architektu 65-49, Sovetunio.

* Dana Geržova, 32-j., kolektas bk kaj glumarkojn. Adr.: Uničovska 63, 78501 Šternberk, Ĉeĥoslovakio.

* Daukulis Aivars dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Perlu-19, Cesis, Latvio, Ud SSR 228500, Sovetunio.

* Jacqueline Fleischer, 14-j. knabino, dez. kor. kun samaĝuloj el Azio, Aŭstralio, Afriko, Ameriko kaj Francio pri ĉt. Adr.: Friedensstr 15, Warin, 2723 Germanio.

La ĉarmo de bluo

Foto de CAI HAIFENG

En la kunveno pri modernaj vestoj por 1991, okazinta en la Amuza Palaco de Pekino, projektistoj de la Pekina Instituto de Vestoj prezentis la de ili fasonitajn modernajn vestojn "Ĉarmo de bluo" en serio. Tiuj bluaj vestoj estos kredeble ŝatataj de la publiko. La foto montras, ke fraŭlino Ye Jihong, gajninto de la unua premio en la konkurso de manekenoj en 1990, prezentas tiuspecan veston.





AMUZOJ

Ludoj

1. Plenigu la blankajn cirklojn per la ciferoj 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7 respektive, por ke la diferenco de la sumo de la du nombroj en la cirkloj de ambaŭ finoj de ĉiu linio minus la nombro en la cirklo meze de la linio estu egala al la nombro.

2. Aldonu 2 rektajn liniojn al la bildo, por ke aperu 3 samgrandaj trianguloj.

(Solvoj troveblaj en ĉi numero)



UNUE ELLOGIĜU KATO

Tours telefonis al kuracisto: "Doktoro, venu rapide! Jack ĵus englutis muson viva."

"Mi tuj," diris la kuracisto. "Unue Jack malfermu la buŝon kaj vi metu antaŭ lin pecon da kuko..."

Post kelkaj minutoj venis la kuracisto. Li trovis, ke Tours tenas super si pecon da sardinaĵo antaŭ la dometo de Jack.

"Kial?" demandis la kuracisto. "Mi diris, ke vi portu kukon... Ĉu vi ne havas ĝin?"

"Mi havas, sed nun ni devas unue ellogi al ni la katon."

KOREKTO

Anstataŭ "Flom Walt" legu "Walter van den Kieboom" sur p. 19, dekstra kolumno, 5-a linio de malsupre, n-ro 11, 1990, EPĈ. Ni petas pardonon de s-ro Walter van den Kieboom.

La Red.

Enciklope- dieto de Ĉinio

En Ĉinio Shang-dinastio (ĉ. la 16-a jc a.K. — la 11-a jc a.K.) estis la plej frua dinastio, en kiu oni registris historion. Tiam aperis skriboj sur ostoj aŭ testudaj ŝeloj. En Shang-dinastio oni komencis muldi diversajn bronzaĵojn. Sur ili oni muldis skribojn. Dank' al la supre menciitaj skriboj, oni konigis la politikon, ekonomion, militafieron kaj kulturon, kiuj prezentis la vastan socian fizionomion de la dinastio.

Ĉinaj pro- verboj

*Oro vera ne timas fajron,
Vero venkos la kalumnion.*

*El la laboro naskiĝas ĝojo,
Unuiĝo kondukas al venko.*

*Mono kaj oro neniam alportas
veran riĉon,
El unuiĝo kaj harmonio kreskas
feliĉo.*

*Belaj floroj ĉiam estas akom-
panataj
de verdaj folioj.*

*Pli multe da birdoj vivas en fek-
undaj lokoj,
Pli multe da amikoj havas bon-
koraj homoj.*

Frاندemo

Iam vivis frandemaj patro kaj filo. Iutage ili gastis ĉe sia amiko. Dum la manĝo ili manĝis ekskluzive bongustajn pladojn. Ili longe manĝegis. Satmanĝinte, la filo volis sin amuzi ekstere, sed li ne povis transpaŝi la sojlon pro troa sato. Vidinte tion, la patro insultis: "Fi! Tiel frandema, ci eĉ ne povas transpaŝi la sojlon. Se mi ne estus tiel sata, ke mi ne povas forlasi la seĝon, mi certe cin batus."

Karikaturo

Penu! Penu! Penu! Penu!

Humuraĵoj

PATRO

Trafika akcidento okazis en urbeto. Amaso da homoj rigardis ĉirkaŭ la okazejo. Iu malfrue venis kaj ne povis alproksimiĝi al ĝi. Li do laŭte kriis: "Mi estas la patro de la vundito, cedu al mi la vojon!"

Tamen, trapaŝiĝinte tra la homamaso, li vidis, ke la vundito estas azeno.

RAJTO DE KRITIKO

Post akra disputo verkisto diris al kuiristo: "Vi ne rajtas kritiki la libron, ĉar vi neniam verkis."

"Kia absurdo!" kontraŭdiris kuiristo. "Mi neniam metis ovon, tamen mi povas gustumi frititan ovon. Ĉu la kokinoj povas tion fari?"

Inspiro de ebriiĝo

ANTAŬ 1 700 jaroj en Anhui-provinco de Ĉinio estis kuracisto, kiu nomiĝis Hua Tuo. Dum multe da jaroj li rondiris en la provincoj Anhui, Shandong, Henan kaj Jiangsu por kuraci la popolon. Lia kuracarto estis alta kaj lia helpo fervora, tial la popolo tre estimis lin kaj nomis lin "Magia Kuracisto".

Sed li ofte sentis ĉagrenon pro iu afero. Tiutempe narkotaĵo ne estis inventita, kaj operacio estis terure doloriga. Kvankam ofte la operacioj estis sukcesaj, ta-

men la operaciitoj suferis de dolorego.

Foje Hua Tuo venis en iun vilaĝon. Knabo en la vilaĝo estis suferanta de furunko sur brako. Kiam Hua Tuo faris al li operacion, ĉi tiu ploregis, kriegis kaj saltegis pro la dolorego. Hua Tuo devis peti ŝnurligi la knabon kaj forte premi lin. La operacio iris malfacile.

La sufero de la knabo turmentis Hua Tuo, kiu pensis: "Kiel bone estus, se malsanuloj ne sentus doloron dum operacio!"



Iun tagon kelke da homoj portis al Hua Tuo vunditan viron. La viro falis en kanalon kaj rompis al si kruron. Kiam Hua Tuo faris al li operacion, la vundito ne moviĝis. La operacio iris glate kaj, kiam ĝi finiĝis, la operaciito ankoraŭ ne rekonsciiĝis. Lia kvieta dormo kaj regula spirado montris, ke la vundito ne sentis doloron dum la operacio.

Kial li ne sentis doloron? Ĉar li morte ebriiĝis. Hua Tuo pensis, ke malsanuloj ne sentos doloron dum operacio, se ili prenos ian medikamenton kaj senkonsciiĝos kiel ebriulo.

Hua Tuo komencis esplori. Li kolektis multe da preskriboj, faris multajn eksperimentojn kaj fine elfaris narkotaĵon, kiun li nomis Mafeisan.

Foje al Hua Tuo venis boatisto suferanta de ventra doloro. Hua Tuo opiniis, ke lin turmentas apendicito kaj necesas por li tuja operacio. Li ordonis al la boatisto trinki Mafeisan. Post momento la boatisto senkonsciiĝis. Hua Tuo malfermis lian ventron, for-tranĉis la ulceran apendicon, kunkudris la tranĉon kaj surmetis medikamenton. La malsanulo tute ne sentis doloron kaj resaniĝis post monato.

Inspirite de ebriiĝo, Hua Tuo elfaris la narkotaĵon Mafeisan, multe kontribuante al la medicino de la homaro. ■

Videobendo

"ĈINA MASAĜO"

Ĉu vi volas posedi la teknikon de masaĝo? Por tio vin helpos la videobendo "Ĉina Masaĝo". La videobendo 75-minuta prezentas al vi la masaĝan teknikon por kuracado de oftaj malsanoj, kiel kontuzoj, ostologiaj kaj internaj malsanoj. "Ĉina Masaĝo" en Esperanto PAL (VHS) kostas 80 usonajn dolarojn. Dezirantoj bonvolu sendi la monon al: Eĵ Popola Ĉinio P.O. Kesto 77, 24 Baiwanzhuang Lu, Fuchengmen Wai, Pekino 100037, Ĉinio.

ZHANG DEPU:

Profunda amikeco



La aŭtoro (dekstre), Gelja Konstantinovna (maldekstre) kaj ŝia filo

DE 1956 mi memlernis Esperanton. Por plue lerni kaj apliki la artefaritan lingvon, mi elektis sovetian samideaninon kiel mian korespondantinon, el la rubriko "Korespondi Deziras" de "El Popola Ĉinio". Ŝi nomiĝas Gelja Konstantinovna kaj estis analizistino en iu instituto de Leningrado. De la komenco de la 60-aj jaroj ni korespondis en Esperanto kaj ni konsentis korespondi unu fojon ĉiumonate. Bedaŭrinde, la dekjara tumulto de Ĉinio komencita en la meza periodo de la 60-aj jaroj ĉesigis nian korespondon.

En septembro 1985, kiel membro de la ĉina delegacio mi partoprenis la 5-an Internacian Librofoiron en Moskvo kaj vizitis Leningradon kaj Kievon. Kiam mi atingis Leningradon, la hejmlokon de mia leteramikino, min kaptis firma volo vidi ŝin. Bedaŭrinde, mi forgesis ŝian adreson. Kiel trovi tiun ĉi ordinaran civitanon en Leningrado? En la lasta tago antaŭ nia forlaso de la urbo, instigate de aliaj membroj, mi esprimis mian deziron al servistoj de la hotelo, ke loka civila administracio helpu serĉi mian amikininon. Du servistoj konsentis kun tio kaj afable transprenis mian slipon kun ŝiaj aĝo kaj nomo.

Tiutage, ni okupiĝis pri vizitado kaj je la 23-a horo revenis la

hotelon. Kiam mi atingis la pordon de mia ĉambro, mi jam aŭdis la telefonan sonadon en ĝi. Kiam mi eniris la ĉambron kaj levis la aŭdilon, mi aŭdis emocian voĉon de sovetia virino: "Ĉu vi estas kamarado Zhang Depu el Ĉinio?" Mi respondis: "Jes." Ŝi daŭrigis: "Mi estas via leteramikino Gelja Konstantinovna." Tiam mi ne povis eldiri eĉ unu vorton pro ĝojo nek kuraĝis kredi al miaj oreloj. Fakte, la fervoraj servistoj trovis ŝiajn nomon kaj adreson en la telefonlibro kaj diris al ŝi mian telefonnumeron. En la posttagmezo ŝi plurfoje telefonis al mi, sed malsukcesis. El la aŭdilo senĉese aŭdiĝis ŝia emocia voĉo. Ni kore salutis kaj zorgeme demandis unu la alian en Esperanto kaj en la rusa lingvo. La interparolo daŭris duonhoron. Fine, ŝi decidis, ke en la sekvanta posttagmezo ŝi venos viziti la ĉinajn kamaradojn en la hotelo.

En la unuafoja intervidiĝo, la firma manpremo kaj varma ĉirkaŭprenado profunde emociis ĉiujn ĉeestantojn. Ŝi venis kun sia filo Saŝa. Antaŭe, kiam ŝi korespondis kun mi, ŝi estis fraŭlino, tamen nun ŝia filo estas deklasa lernanto. Ni ambaŭ alte taksis la intervidiĝon kaj intime interparolis. Por eterne memori ĝin mia kolego fotis nin tri. Ĉe la adiaŭo ŝi diris al mi, ke ŝia filo forvidos min en la flughaveno tuj je la

venonta mateno kaj donacos al mi elektran samovaron en forta rusa stilo. Mi danke rifuzis tion.

En septembro 1987 mi partoprenis la 6-an Internacian Librofoiron en Moskvo. Informiĝinte pri tio, ŝi sendis sian filon speciale al Moskvo por viziti min kaj donaci al mi la elektran samovaron kun biskvitoj preparitaj de ŝi mem.

En septembro 1989, mi refoje venis al Sovetunio por partopreni la 7-an Internacian Librofoiron en Moskvo. Unu tagon post ĝia fermiĝo Gelja Konstantinovna kaj ŝia 75-jara Esperanta instruistino Cvetkova, prezidanto de la Esperanto-Klubo en Leningrado, venis al Moskvo por min viziti. Tio estis la duafoja intervidiĝo post kvar jaroj. Alia esperantistino Zhou Qianyun, membro de la ĉina delegacio, kaj mi ĝoje intervidiĝis kun la du sovetiaj esperantistinoj. Dank' al Esperanto ni ĝoje interparolis kaj kune fotiĝis.

S-ino Cvetkova estas esperantistino de maljuna generacio. Pro maljuneco jam ne facila estis ŝia paŝado. Tamen, ŝi venis al Moskvo por min viziti, kio profunde emociis nin. Ŝi multfoje esprimis la deziron, ke la esperantistoj de la du landoj plifortigu la interligiĝon kaj kunlaboron, por realigi la noblan idealon de Zamenhof kaj profundigi la kompreniĝon kaj

amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Sovetunio. En la sekvanta tago mi kaj Gelja denove intervidiĝis en la Kultura kaj Ripoza Parko de Gorkij. La ĉielo estis serena. Veturante per telfero ni multe ĝuis naturan pejzaĝon kaj veturante per vaporŝipo ni ekskursis sur la Moskva Rivero.

Ni kaj vojaĝis kaj interparolis pri niaj familioj kaj edukado de la infanoj. Ĉe la vesperiĝo ni adiaŭis

kun bedaŭro. Ŝi foje-refoje esprimis sian deziron adiaŭi nin en la sekvanta tago en la flughaveno kaj diris, ke tio estas kutimo de la civitanoj de Leningrado. Mi for dankis sian deziron. Fine ŝi konsentis adiaŭi nin ĉe la pordo de la hotelo. Je la 7-a h vespere de la sekvanta tago, kiam ni membroj de la ĉina delegacio pretis veturi al la flughaveno, ŝi, s-ino Cvetko-

va kaj kelke da junaj esperantistoj venis al la hotelo "Rusio" kaj manpremis kun ni. Ni ĉiuj emociiĝis ĝis larmoj kaj ne povis nin kvietigi. Tiam mi meditis pri tio, ke la sovetiaj amikoj esprimis sian kamaradecan amikecon ne nur al ni dekelkaj membroj de la ĉina delegacio, sed ankaŭ al ĉiuj ĉinaj esperantistoj kaj la ĉina popolo. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respond-kuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Lü Shenggen dez. kor. kun esperantistoj el Latinameriko kaj Afriko. Adr.: Qin Ye Lu 70, Changzhou, Jiangsu 213016, Ĉinio.

* Ju Yang, 31-j. oficisto, dez. kor. kun tutmondaj esperantistoj precipe tiuj, kiuj parolas en angla aŭ japana lingvo, pri internacia vojaĝo kaj alia ajn temo. Adr.: Shiwei Zuzhibu, CN-436400, Wuxue, Hubei, Ĉinio.

* Wu Jun, 25-j., dez. kor. tm. pri diversaj temoj. Adr.: Dong Shi Yin Shua Zhi Xiang Chang, Ming Guang Lu, Hefei, Anhui 230011, Ĉinio.

* Yang Peicai dez. kor. kun germanaj esperantistoj, interesiĝas pri turismo, ekonomio kaj literaturo, kolektas pm., kaj E-librojn. Adr.: Huai Nan Shi You Chang, Huainan, Anhui 232007, Ĉinio.

* Jia Juncheng dez. kor. tm., interŝ. pm. kaj E-stampojn. Adr.: Gan Quan 3 Cun 242 Hao 403 Shi, Shanghai 200061, Ĉinio.

* Saulo Zacarias Saraiva da Silva, dez. kor. kun geesperantistoj el tuta mondo. Respondo garantiata. Adr.: Caixa Postal 385, Juiz de Fora, 36001, MG, Brazilo.

* Membroj de la Esperanta Klubo dez. kor. tm. Adr.: La Esperanta Klubo, Badulla Madya Maha Vidyalya Badulla, Sri-lanka.

* Farhad Bagheri, 19-j. nova esperantisto, dez. kor. tm, pri ĉt. Adr.: F.B., 24-rue Arman, Bld. Sazman Ab, 91849-Maŝhado, Irano.

* Jadranka Ŝoŝtaric dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj Esperante kaj angle, interesiĝas pri arto kaj joko. Adr.: ul. 1. Gregurovica 2, 41 230 Krapina, Jugoslavio.

* Gromiko Stanislav, 25-j., dez. kor. pri ĉt, interesiĝas pri uŝuo, daosismo, vojaĝo kaj insignoj. Adr.: 2-Mikrorajon, 4-55, Celinograd, 473033 Sovetunio-Kaz SSR.

* Charles kaj Jose, 25-j. komentantoj, dez. kor. tm. pri ĉt. Adr.: Rua Floriano Peixoto, 1369 BR-38.440 Araguari-MG, Brazilo.

* Szedmak Sylvia, 18-j. fraŭlino, dez. kor. kun fraŭlinoj Esperante, angle aŭ france. Adr.: 16 Rue

Pasteur, 59223 Roncq, Francio.

* Aneta Mielniczek, lernantino, dez. kor. kun ĉinaj kaj japanaj esperantistoj pri ĉiuj temoj. Adr.: ul. Grunwaldzka 58/18, 37-700 Przemysl, Pollando.

* Evandro Jung Barbosa dez. kontaktiĝi kun kolektantoj de pm. kaj interŝ. pm. (sed nur blokoj). Adr.: A/C Celeso, BR 89800 Chapaco SC, Brazilo.


* Hamid Garabaghi dez. kor. kun tutmondaj esperantistoj. Adr.: No 64 Irancar Ally, Last Talegani Ave Tabriz Iran, Co 51648.

* Francis Portelli, 30-jara fraŭlo, dez. kor. pri ĉt. Adr.: 67 Qormi Rd., Marsa, Malta.

* Silke Börner kolektas kaj interŝ. alumetskatolojn (plenaj seblas) ĉiospece kaj tutmonde. Adr.: Tieckstr. 26, D-3000 Hannover 61, Germanio.

* Multaj diversaĝaj gerumanoj dez. kor. tm. Skribu al Vasile Albu 9 Eroilor 2400 Sibiu Rumanio.

La solvoj de la ludoj



ESP-NOVAĴOJ

● De la 23-a ĝis la 27-a de septembro 1990 okazis en Qingdao, Shandong-provinco, Ĉinio, la prepara kunveno de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestis s-ro William R. Harmon, ĉefdelegito de UEA en Nord-Ameriko, s-ro Yosimi Umeda, eksvicprezidanto de UEA, s-ro T. Nishikawa, prezidanto de la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj, Japanio, s-ro Puramo Ĝong, estro de la Internacia Fako de la Korea Esperanto-Asocio, kaj respondeculoj de la Ĉina E-Ligo kaj Shandong-a E-Asocio.

En la kunveno oni diskutis pri la organiza projekto, dato, agadoj kaj grupiga maniero de la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto.

● La konsilantaro de la Ĉina E-Ligo elektis s-ron Liu Zhen, respondeculon de la urbo Qingdao kaj honora prezidanto de la Qingdao-a E-Asocio, kiel vicprezidanton de la Ĉina E-Ligo.

● La Scienc-Teknika E-Instituto kune kreita de la Ĉina Scienc-Teknika Administra Universitato kaj la Sciencista-Teknikista E-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj komencis akcepti lernantojn en aŭtuno de 1990. Nun en ĝi funkcias du fakoj, nome, internaciaj ekonomio kaj komerco, akupunkturo kaj masaĝo. En la antaŭa fako oni lernas 4 jarojn kaj en la lasta 2 jarojn. La unuaj 53 lernantoj studos ankaŭ aliajn studobjektojn krom Esperanto.

Ankaŭ la stomatologia fakultato de la Ĉina Scienc-Teknika Administra Universitato prenis Esperanton kiel devigan kurson aŭtune de 1990.

● Liu Huozi, honora membro de la konsilantaro de la Ĉina E-Ligo kaj eksprezidanto de la Ŝanhaja E-Asocio, forpasis novembre de 1990 en la aĝo de 79 jaroj. De multaj jaroj s-ro Liu okupiĝis pri gazetara laboro. Li laboris kiel ĉefredaktoro de la ĵurnalo de Hongkong Wenhuibao kaj ĉefredaktoro de "Jarlibro de la Ĉina Enciklopedio". En 1979 li estis elektita kiel membro de la konsilantaro de la Ĉina E-Ligo.

● Pro longa malsano s-ro Armand Su, honora membro de la konsilantaro de la Tianjin-a E-Asocio, forpasis septembre de 1990 en la aĝo de 53 jaroj. Li ek-lernis Esperanton jam en la juneco kaj publikigis multajn poemojn kaj artikolojn en ĉinaj kaj alilandaj Esperantaj gazetoj.

● La membraro de la Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj honoris la japanan verkiston Rihej Nomura, pro lia filologia verko: ZAMENHOFA EKZEMPLARO, per la PREMIO-OSIEK-1990. Ĉi tiu premio estas je 300 ekuoj.

● Ĉi-jare Esperanto elstare aperis kiel unu el la 902 ekspoziciantoj pro iniciato kaj prizorgo de Brazila Esperanto-Ligo, kadre de la 11-a Internacia Bienalo de la Libro, okazinta de la 25-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro/1990 en la urbo São Paulo, Brazilo. Ĝi

estas la plej granda kultura evento en Latin-Ameriko kaj la kvara en la mondo. En ĝi la unuan fojon Esperanto havis propran standon kaj montris 300 titolojn (690 ekzempleroj), el kiuj du trionoj vendiĝis surloke.

● Ĝenerala direkcio de ĈSD/Ĉeĥoslovakaj Ŝtataj Fervojoj kun Sciencoteknika Komitato por Trafiko, sekcio de Fervojo kaj Fervojista sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio aranĝos internacian konferencon FERVOJO SOJLE AL 3-a JARMILO en Brno (CS), 1991-05-09/10, sub aŭspicioj de ĝenerala direktoro de ĈSD Ivo Malina.

Dum la konferenco la laborlingvoj estos la ĉeĥa aŭ la slovaka, la angla kaj Esperanto kaj oni faros simltanan interpreton.

Oni traktos en jenaj sekcioj: A. historio de la fervojo; B. moderna fervoja tekniko; C. Fervoja trafiko; D. Futurologio de la fervojo; E. Esperanto kaj fervojo. Pliajn informojn kaj aligilon petu de D-ro Petr. Chrdle, VUŽ-Fervoja Esplorinstituto, U Lužického semináře 3, CS-11857 Praha 1.

● Poŝtofiĉejo STRAŽNICE, distr. Hodonin, Ĉeĥoslovakio, uzadas dum tagoj 20. 08. - 19.09.1990 porokazan E-afrankmaŝinstampilon (tipo POSTALIA) kun ĉeĥa teksto: "100 let prvni ĉeske učebnice esperanta F.V. LORENZ", (Esperante: "100 jarigo de unua ĉeĥa lernolibro de Esperanto F.V. LORENZ").

En la 11-a Internacia Bienalo de la Libro



Poŝtkarto kun stampo en Esperanto kaj la ĉina lingvo memore al la 21-a Monda Poŝttago



KURANTAJ AFEROJ

EKONOMIO

● De januaro ĝis septembro de la lasta jaro Ĉinio sankciis fondiĝon de pli ol 4 700 fremd-investaj entreprenoj kun interkonsentita investo de pli ol 4 miliardoj da usonaj dolaroj, el kiuj 2.2 miliardoj da usonaj dolaroj jam estis efektive investitaj. Tio ne nur superis tiun de la responda periodo en 1989, sed ankaŭ kreis novan rekordon.

● Ĝis la fino de septembro 1990 Ĉinio jam sankciis fondiĝon de 26 500 fremd-investaj entreprenoj kun interkonsentita investo de 37.8 miliardoj da usonaj dolaroj, el kiuj 17.7 miliardoj jam estis efektive investitaj.

● La produktokvanto de nafto en Ĉinio konstante kreskis en la lastaj 9 jaroj. En 1990 Ĉinio produktis ĉirkaŭ 138 milionojn da tunoj da nafto, kio estas nova rekordo. La petrola produktokvanto de Ĉinio nun okupas la 6-an lokon en la mondo. La plej produktivaj regionoj kuŝas en la nordoriento kaj oriento en Ĉinio.

● Ĉinio havas teogardenojn de entute miliono da hektaroj, La cifero estas la plej granda en la mondo. En 1989 Ĉinio produktis 540 000 tunojn da teo kaj eksportis 204 600 tunojn.

● La produktokvanto de greno en Tibeto en la lasta jaro kreis la rekordon de 560 milionoj da kg. Tio kreis la rekordon de greno-produkto en tiu regiono. Kresko daŭris dum la lastaj 3 jaroj. La nombro de brutoj tie jam atingis 22 990 000, 2.41-oblo de tiu antaŭ 1959, la jaro de Demokratia Reformo de Tibeto.

SOCIA VIVO

● La 4-a Censo en 1990 montris, ke de post la 3-a Censo en 1982 la ĉina loĝantaro en la lastaj ok jaroj pliiĝis je 125 507 213 personoj. La ĉina ĉeftero nun havas 1 133 602 501 loĝantojn. La tuta loĝantaro de Ĉinio, inkluzive de tiuj de Taiwan, Hongkong kaj Aomen, estas 1 160 017 000.

● Ĉinio estas la lando, kiu havas plej multe da handikapuloj. Specimena kontrolo tra la lando en 1987 montris, ke en la lando vivas entute 51 milionoj da handikapuloj, ĉirkaŭ 4.9% de la tiama tutlanda loĝantaro.

La ĉina registaro disponis multe da personoj kaj materialoj en servo por handikapuloj. En la lastaj jardekoj establiĝis 41 000 specialaj entreprenoj por handikapula bonstato, en kiuj laboras 12 900 000 handikapuloj. Progreso evidentas ankaŭ en klerigo, medicina servo, amuzado, sporta-

do, publika servo kaj socia medio por handikapuloj.




Handikapuloj sin ekzercas en la Ĉina Konvaleska Centro.

SCIENCO KAJ TEKNIKO

● En Bohai-golfo, oriento de Ĉinio, oni fosis ŝakton profundan je 420.12 metroj sub la marfundo, el kiu oni elfosis multajn fosiliojn kaj akiris donitaĵojn pri du karbotavoloj. Tio unuafoje pruvis, ke riĉfondo de karbo ekzistas en la marfundo proksime al Longkou, Shandong-provinco, Ĉinio. Tio markas, ke Ĉinio jam sin vicigis inter la teknike avangardaj landoj en esplorado de solida marfunda mino kaj en proksima estonteco Ĉinio ekfosos karbon el marfundo.

● La unua impulsa nuklea reaktoro en Ĉinio konstruiĝis lastatempe en la Sudokcident-Ĉinia Reaktora Inĝenieria Instituto. Tio faris Ĉinion la dua lando posedanta projektan kaj kontrudan teknon de tia reaktoro; la unua lando estas Usono. Per la reaktoro oni povas fari neŭtrono-fotadon, analizon de neŭtrono-aktivado, produkton de izotopo, radiado-teston kaj sekurecan esploron de dinamika analizatoro. Ĝi povas esti aplikata al industrio, agrikulturo, nacia defendo, scienca esploro, eduko, medicino kaj aliaj kampoj.

● Sciencistoj de la Ĉina Rizo-Instituto per metodoj de bio-inĝenierio kaj novaj materialoj sukcesis kulturi rizon sur akvo. Tio prezentis larĝan perspektivon por akvo-surfaca utiligo. Per sentera kultura tekniko kaj respondaj inĝenieriaj metodoj, la sciencistoj plantis rizon sur flosaĵoj el iaj materialoj sur riveroj, akvorezervejoj, lagoj ktp.



Sceno el la dramo "Pekinanoj"

● Jona stomatologia dentobroso inventita de Wang Ling nun jam akiris patenton en 13 landoj kaj regionoj.

Tiu dentobroso el speciala hararo, transistoro kaj butonpilo purigas dentojn 7-10-oble pli efike ol ordinara dentobroso kaj kuracas dento-malsanojn per masaĝo kaj drogo-penetrigo. Nun tiaj dentobrosoj jam vendiĝas en Usono, Nederlando, Belgio, Japanio kaj aliaj landoj.

● La karpino kreskas pli rapide je 20-30% ol la virkarpo. Laŭ tiu leĝo esplorantoj de la Akvoanima Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj el-kulturis novan tute inseksan fiŝ-specion per metodoj de ĉelo-inĝenierio kaj ekscito de maskla hormono.

Konturo de kuŝa budho



Tiu tekniko atingis la mondan avangardan nivelon.

KULTURO

● Komence de la lasta novembro en la Ĉefurba Teatro, Pekino, okazis la gratula ceremonio por la 65-jariĝo de la teatra aktivado de Cao Yu, eminenta ĉina dramisto.

Cao Yu, prezidanto de la Ĉina Federacio de Literaturistoj kaj Artistoj, verkis *Ŝtormon*, *Sunleviĝon*, *La Sovagan Kampon*, *Transformiĝon*, *Pekinanojn*, ktp., kiuj estas ripetade prezentataj kaj ĉiam bonvenaj al la publiko. Ankaŭ liaj verkoj verkitaj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko en 1949 estas ŝatataj de la publiko, ekzemple *Serena Ĉielo*, *Venĝo de Reĝo*, *Belulino Wang Zhaojun* ktp.

● Sub la influo de urba kulturo, kamparanoj ĉirkaŭ Ŝanhajo sin amuzas kiel urbanoj. Aperas kamparanaj gitarbandoj, disko-trupoj, fanfaroj, popmuziko ks.

En la Nacia Kampara Kantista Konkurso okazinta lastatempe la junaj kantistoj neniel aspektis kiel kampuloj, ĉu veste, ĉu kant-maniere. Ili plejparte kantis kantojn nun popularajn en urbo. Iuj eĉ kantas en fremda lingvo.


● Belega freskego malkovriĝis en antikva tombo en Cixian-gubernio, Hebei-provinco. Elfositaj estas ankaŭ multaj jadaĵoj, fajencaĵoj kaj 2 000 terakotaj homoj. La plejparto de la homfiguroj altas je 30-50 cm., dum iuj grandaj altas kiel vera homo. La tombo datiĝas jam de 1 400 jaroj.

● Kolosa "kuŝanta budho" konsistanta el montoj estis malkovrita lastatempe ĉe la urbo Leshan, Sichuan-provinco. Ĝi estas kelkdekoble pli granda ol la fama Budho-statuego de Leshan, kiu estas la plej granda ŝtona budhostatuo en la mondo.

Tiu kuŝanta budho estas malkovrita de maljuna vojaĝanto el Guangdong-provinco en la lasta majo. Unu el la fotoj faritaj de li sugestis monton en formo de kuŝanta viro, kies korpo estas videbla de la kolo ĝis la piedoj. Lasta-septembre la Kultura Departemento de Sichuan-provinco sendis fakulojn esplori ĉeloke. La fakuloj konstatis, ke ja estas kolosa budho-statuo kuŝanta en rivero kun kapo sude kaj piedoj norde. Rigardate de malproksime la 4 000-metra budho ja aspektas laŭmezura, eleganta kaj ternermina. Tamen restas enigmo, ĉu ĝi estis kreita de prauloj, aŭ de la naturo.



Reordigo de surrokaj bildoj



Surrokaj bildoj en Helanmontaro

Teksto de WU XIAOCHANG

Fotoj de WU XINHUA

Kelkmil-jaraj surrokaj bildoj de Helanmontaro 100 km okcidente de Yinchuan, la ĉefurbo de la Ningxia-a Huj-nacieca Aŭtonoma Regiono, estis reordigitaj antaŭ nelonge kaj eksponataj unuafoje en Pekino. Tio multe interesas en- kaj eksterlandajn fakulojn.

La bildoj estis faritaj de hunoj, tuĝjueoj, hujheoj kaj mongoloj, kiuj vivis antikve en la montaro. La bildoj figuras leonojn, ornitorinkojn, bovojn luktantaj kun lupo, cervojn kaj homajn kapojn similajn al ŝminkitaj vizaĝoj en

Bildo de bovoj luktantaj kun lupo




Bildo de ideogramoj






Bildo de tigro



Bildo de ornitorinkoj



modernaj operoj. La pli ol 20 000 bildoj, kiel riĉa kultura heredaĵo, estas rigardataj kiel grandioza epopeo kaj galerio de la nacia kulturo de norda Ĉinio kaj estas tre valoraj por studi la historion, religion, belarton, pikturon, skulpturon kaj popolajn morojn de la antikvaj nacioj de norda Ĉinio.

Admirindas, ke sur krudaj rokmuroj oni faris per ŝtonaj kaj feraj instrumentoj bildojn kun plastikaj figuroj el fortaj linioj.



Bildoj de dio

Bildo de generado



Bonaj medikamentoj por via sano



Parto de la produktaĵoj de la fabriko

La Nordorienta Ĝenerala Medikamento-fabriko de Ĉinio jam vendis siajn bonkvalitajn produktaĵojn al pli ol 50 landoj kaj regionoj. Ĝi volonte servos al klientoj de ĉiuj mondpartoj.

Mendu ĉe:

Nordorienta Ĝenerala Medikamento-fabriko
No. 12 San Duan
Beierlu St.
Tiexiqu, Shenyang
Ĉinio
Tel. 505261
Telegramo 5522
Telekso 80038 NEGPE CN

La fabrikestro



Listo de medikamentoj haveblaj

- Vitmino A (Vitamin A)
- Vitmino B1 (Vitamin B1)
- Vitmino C (Vitamin C)
- Vitmino D2 (Vitamin D2)
- Vitmino E (Vitamin E)
- Tiamino Mononitrato (Thiamine Mononitrate)
- Kloramfenikolo (Chloramphenicol)
- Rifampino (Rifampin)
- Tetraciklino (Tetracyclin)
- Berberina Klorido (Berberine Chloride)
- Fosfomicina Natrio (Fosfomycin Sodium)
- Fosfomicina Kalcio (Fosfomycin Calcium)
- Cefaleksino (Cefalexine)
- Cefotaksima Natrio (Cefotaxime Sodium)
- Hidrokortizono (Hydrocortisone)
- Prednizona Acetato (Prednisone Acetate)
- Prednizolono (Prednisolone)
- Betametazono (Betamethasone)
- Fluocinonido (Fluocinonide)
- Sulfadiazino (Sulfadiazine)
- Sulfadiazina Arĝento (Sulfadiazine Silver)
- Glukozo (Dextrose)
- Piracetamo (Piracetam)
- Amantadino (Amantadine)
- Propranolola Hidroklorido (Propranolol Hydrochloride)
- Kafeino (Caffeine)
- Etambutola Hidroklorido (Ethambutol Hydrochloride)
- Sukralfato (Sucralfate)
- Furazolidono (Furazolidone)
- Febuprolo (Febuprol)
- Aluminiĥa Hidroksido (Aluminium Hydroxide)
- Acida Aminobutiriko (Acid Aminobutyric)
- Teofilino (Theophylline)
- Venorutono (Venoruton)
- Kalia Jodido (Potassium Iodide)
- Piraloksima Metilklorido (Pyradoxime Methylchloride)
- Flufenazina Dekanoato (Fluphenazine Decanoate)
- Benzidamina Hidroklorido (Benzydamine Hydrochloride)
- Furosemido (Furosemide)

LAŬ LA SUDA SILKA VOJO (21)

La vojo Tengchonglu

Teksto de XU YE kaj WANG QINGHUA

Fotoj de XU JINYAN

Jadaĵo de Tengchong

Ŝtupar-kampoj en Gaoligong-montaro





Reveno de foiro

OKCIDENTE de Baoshan, la Suda Silka Vojo, trairinte la kanjonon de Nujiang-rivero kaj transirinte la neĝkovritan montaron Gaoligong, dividiĝis en la branĉojn sudan kaj nordan ĉe la urbo Zhugeliang. La norda branĉo, nomata la vojo Tengchonglu, trairas Tengchong kaj Guyong kaj eniras Birmon. La suda branĉo, nomata la vojo Dehonglu, trairis Longling kaj Dehong kaj ankaŭ eniris Birmon.

LA KANJONO DE NUJIANG-RIVERO

Nujiang-rivero ricevis la nomon pro sia muĝado kaj torento (*nu* ĉine signifas koleron kaj *jiang* — riveron). La rivero estas profunda kaj nigra, tial en la antikveco ĝi portis la nomon Nigra Rivero. La rivero originas ĉe la suda piedo de Tanggula-montaro sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo. Kaj la parto fluanta en Ĉinio longas 1 540 km. La tibetanoj nomas ĝin Nagqu-rivero (Nigra Rivero). Enfluante la valon de la montoj Tanianweng kaj Boshula, ĝi alinomiĝas Nujiang-rivero. Trafluante de norde suden la okcidentan Yun-


nan, ĝi eniras Birmon kaj portas la nomon Salveno.

La Suda Silka Vojo trairas Lujiang-ebenaĵon, sur kiu milde fluas suden Nujiang-rivero kun larĝa lito. La ebenaĵo de longe ĝuas famon. Okcidente de ĝi staras la majesta Gaoligong-montaro kaj oriente de ĝi kuŝas Nushan-montaro. Ambaŭborde de Nujiang-rivero kaj sur la orienta deklivo de Gaoligong-montaro ĉie vidiĝas ruinoj de antikvaj vojoj,

mortis de maligna malario.

Lujiang-ebenaĵo antikve nomiĝis Qiongdan, kun malalta topografio kaj varma klimato. La ebenaĵo estas eterne verda. Inter arbedoj kaj herboj ofte vidiĝas serpentoj kaj aliaj bestoj. Sur la ebenaĵo loĝas ĉefe taj-oj. Ili kultivas rizon generacio post generacio kaj nun ankaŭ tropikajn ekonomiajn plantojn, kiaj sukerkano, kafeo kaj piprarbedo. La loko estas ĉefa sukerproduktejo de la provin-

pasejoj kaj signal-fajraj turoj. En la pasinteco, por atingi la prefektujon Tengyue oni devis trairi Lujiang-ebenaĵon okcidente de Baoshan kaj transpasi Gaoligong-montaron. La irado daŭris tri tagojn. Por atingi Kunming, la ĉefurbon de Yunnan-provinco, oni devis iri unu monaton de Baoshan orienten kaj trapasi 19 poŝtstaciojn. Survoje la varportantoj devis elteni nepriskribeban suferon. Precipe multaj trairintoj de Lujiang-ebenaĵo



co. La malgrandgrajna kafo produktita en la loko povas rivali kun kafo de Brazilo.

GAOLIGONG-MONTARO

Gaoligong-montaro okcidente de Nujiang-rivero je la altitudo de pli ol 3 000 m etendiĝas de norde suden centojn da km kaj formas longan naturan muregon. La Suda Silka Vojo serpentas laŭ la montaro supren ĝis la supro en formo de plurobla S.

Ni transiris aŭte Gaoligong-montaron laŭ la ŝoseo. Kurbigoj kaj montodeklivoj alternis dekojn da fojoj, ke nia rigardo konfuziĝis. Kiam ni rigardis malsupren de la montaro, ni trovis la vojon zigzaga tuj ĉe rokmuro kaj forte terurigiĝis. Malfacile imageblas, kiel transpasis la montaron antikvaj komercistoj kaj pasantoj laŭ la vojo kaŝita inter arboj kaj herboj. Komercistoj de Tang-dinastio (618-907) kantis pri la loko:

*Se reveni hejmen en vintro,
Neĝo baras sur la monto;
Se reveni jam en somero,
Varmo ja sufokas homojn;
Se reveni en primavero,
Mankas mono en la poŝoj.*

El la teksto videblas la malfacilo sur la vojo. Tamen la tiom timigaj rivero kaj montaro ne povis malhelpi la kontakton. Transpasinte la montaron, la Suda Silka Vojo kondukas malsupren al la grava komerca urbo Tengchong.

URBO TENGCHONG

La nomita urbo situas sur malgranda ebenaĵo okcidente de la montaro. En Han-dinastio (206 a.K. — 24 p.K.) ĝi havis la nomon Chengxiang-regno.

Tengchong tuŝas Birmon nordokcidente, kun landlima linio de 148 km. Ĝi estas landlima pasejo de sudokcidenta Ĉinio kaj grava trafikaj kaj komerca urbo de okcidenta Yunnan-provinco. Tie oni elterigis grandan kvanton da antikvaj moneroj kaj ujoj kiel atestaĵoj de la rilatoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj. En Qing-dinastio

(1644-1911) la urbo, kiel antaŭe, estis grava komercejo ĉe la limo de Yunnan kaj Birmo. Tiam multaj karavanoj venis al la urbo el Bhamo de Birmo. Ofte vidiĝis karavanoj el 300-400 bovoj, sed plej ofte vidiĝis karavanoj el ĉ. 1 000 ĉevaloj. En Tengchong amasiĝis granda kvanto da varoj, kiaj kotonono, jado, kupro kaj silko, kiuj estis vendotaj en aliaj lokoj. Inter grandaj karavanoj estis interlandaj firmaoj. Ili aĉetis lokajn produktojn de okcidenta Yunnan kaj vendis ilin en Birmo. Kaj samtempe ili reportis kotonon de Birmo en la provincon. La fama firmao Fuchungheng komercis pri jado kaj kruda silko. Ĝi ankaŭ havis sian filion en Mandalajo, grava urbo de akvo-tera trafiko de Birmo, produktantan silkon kun la marko Leona Globo, kiu havis grandan debiton en Birmo, Hindio kaj Irano.

Tengchong monde famiĝis pro sia prilaboro de jado. Fakte, jado produktiĝis en Birmo. Tengchong estis grava pasejo de la Suda Silka Vojo ĉe la landlimo, tial tie kolektiĝis multe da smeraldo, agato kaj jado. En la antikveco ĉevalaj karavanoj unuj post aliaj venis al la urbo kun jadpecoj grandaj kiel rulŝtonoj, ke ĝi fariĝis grava prilaboro de jadaĵoj. Pro malfacilo en transportado, ĉiuj jad-komercistoj ŝatis aĉeti nur delikatajn jadaĵojn, tiel ke en ordinaraĵoj de Tengchong amasiĝis jado, kiu estis



Lian-plektado

uzata por konstrui vojojn, muron kaj fornon. En la komenco de la kuranta jarcento, en la gubernio Tengchong estis pli ol 500 jad-prilaboroj kun 3 000 artistoj. Tie prosperis prilaborado de jado. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio la antikva jadaĵ-teknologio de la urbo disvolviĝis pluaparte kaj skulpturo estis pli subtila. Ĉiujare oni prilaboris minimume 10 000 delikatajn juvelojn, kiaj braceletoj, orelingoj kaj brilanto por fingringo. Nemalmultaj el ili vendiĝas en la internacia merkato.

Kiel grava pasejo al aliaj landoj, de antikve Tengchong havas vastan kontakton kun ili. Ĉirkaŭ 5 000 homoj el la distrikto Heshun okcidente de la urbo loĝas en 12 landoj kaj regionoj de Eŭropo, Ameriko, Oceanio kaj sudorienta Azio. la biblioteko de la distrikto Heshun estas la plej granda en la kamparo de Ĉinio. Ĝi fondiĝis en 1929, kun pli ol 60 000 ekzempleroj da libroj, el kiuj multaj estas raraj en Ĉinio. Ĝi estas laŭdata




kiel fonto de kulturo.

Forlasinte la guberniurbon Tengchong, ni iris norden laŭ la antikva vojo kaj atingis Guyong, la elirejon de la Suda Silka Vojo ĉe la landlimo. En ĝi ni estis mirigitaj de antikva fortikaĵo staranta ĉe la landlimo. Ĝi staras en la densa arbaro ĉe la limrivero Binglang. La fortikaĵo, masonita sole el ŝtonpecoj, altas je 6 m kaj larĝas je 3 m. Sur la pordo gravurigas la ĉinaj ideogramoj "Fortikaĵo de venko". Proksime de ĝi troviĝas ankaŭ aliaj fortikaĵoj masonitaj el ŝtonpecoj. Interligitaj, ili formas kompletan



De'ang-
naciaj viri-
noj rikoltas
kafon.



Heshun-distrikto



Ombroteatro de Tengchong



Hejmo de primioj

defendsistemon. Iu maljunulo diris al ni, ke siatempе tie garnizonis lisu-naciaj arkopafistoj. La sago estis ŝmirita per drasta veneno. Trafita de ĝi, homo senescepte mortis. Tiu armilo ludis gravan rolon en rezisto kontraŭ invadantoj kaj projekto de la Suda Silka Vojo.

Rigardante sur la fortikaĵo la antikvan vojon etendiĝantan ĝis la profundo de la densa arbaro en Birmo, ni estis kaptitaj de landlima atmosfero kaj admiro al niaj antaŭirantoj, kiuj starigis interrilatojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

Tempo pasas kaj la vojo etendiĝas... ■

NOVAJ PROFESIOJ EN ŜANHAJO

En Ŝanhajo reprosperiĝis profesioj de asekuristo, dom-ter-havaĵa proprietulo, biloborsisto kaj advokato kaj aperis modernaj informoj en la lastaj jaroj. Tio prezentas la internacian aspekton de la plej granda urbo de Ĉinio.

Ĉe la strato Xinzha de Ŝanhajo troviĝas malnova vilao en angla stilo. Ĝiaj mastroj estas advokatoj de la Ŝanhaja Advokatejo por Ekstera Ekonomio. Mia intervjuo kun ĝia estro advokato Mao Baigen daŭris nur unu horon, kaj ĝi estis trifoje interrompita de internacia telefonvoko.

Ŝanhajo ĉe la buŝo de Yangzi-rivero estas centro de en- kaj eksterlandaj informoj. Laŭ nekompleta statistiko, ĉiujare la urbo traktas 30 000 milionojn da bitoj da ekonomiaj donitaĵoj. Ĝia informa indico estas trioble pli granda ol tiu meznombra de la tuta lando. De 1986 la ŝanhaja magistrato laŭplane konstruis informan sistemon. Nun la diversaj ekonomiaj branĉoj posedas siajn informajn sistemojn kaj kun 15 grandaj informaj retoj, kiaj tiuj de magistrato, ekonomio, financo, urbo-konstruado, scienc-informa serĉo, materialo kaj loĝantaro, ĝi havas pli grandan informan reton kun 15 enlandaj urboj.

La ŝanhaja dom-ter-havaĵa komerco disvolviĝas rapide. En la urbo laboras 82 investaj kompanioj por domoj, kiuj ĉiujare vendas domojn de proksimume miliono da kvadrataj metroj. La lastjare fondita Da'an-a Investa Kompanio por Domoj, funkciigata de Ĉinio kaj alia lando, konstruis 18-etaĝan luksan domon, ĉ. mil homoj konkure aĉetis ĝiajn 90 apartamentojn.

Nun, kiam oni promenas surstrate, oni povas vidi, ke brilas neonlampoj ĉe la 5 km longa Nankina Strato, dekoj da hoteloj de almenaŭ tri steloj servas al gastoj kaj pli ol 40 biloborsoj estas multe vizitataj.

(El la ĵurnalo *Renmin Ribao*)

TRI GRANDAJ NACIAJ EPOPEOJ DE ĈINIO

La kirgiza "Manas", mongola "Jianggar" kaj tibeta "Gesar" estas grandaj naciaj epopeoj de Ĉinio.

"Manas" estas epopeo cirkulanta en la kirgiza popolo de la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono de Ĉinio. Ĝi rakontas heroajn agojn de pluraj generacioj de la familio Manas. La kirgizoj nomas kantistojn de "Manas" manasĉi-oj. Je ĉiu geedziĝa, funebra aŭ festa tago, kirgizoj invitas manasĉi-ojn kanti tagnokte. "Manas" enhavas le-

gendojn, historiojn, morojn kaj kutimojn. Ĝi estas rigardata kiel enciklopedio de la kirgiza popolo.

"Jianggar" estas epopeo kantata generacio post generacio de jianggarĉi-oj, mongolaj kantistoj. Ĝi naskiĝis en la interbatala periodo de la mongolaj triboj en ĉ. la 13-a jarcento kaj antaŭ la unuiĝo de la mongola nacieco kaj spegulas la socian realon de la granda tumulto kaj reformo antaŭ la apero de la sklava sistemo.

La epopeo "Biografio de la Reĝo Gesar" cirkulas generacio post generacio en la tibeta popolo. Ĝi rakontas, ke la reĝo Gesar gvidis la popolon kaj venkis la invadantojn. La epopeo konsistas el pli ol 60 volumoj kun miliono da versoj. Ĝi estas la plej longa epopeo en la mondo kaj kvinoble pli longa ol la monde konata epopeo "Maha Bharat" de Hindio.

Oni devas rakonti kaj kanti la epopeon "Biografio de la Reĝo Gesar" ĉe pendanta bildo. Iuj instruituloj asertis, ke tio estas influita eble de literatura stilo de Tang-dinastio (618-907). Se tiu aserto estas fidinda, do la epopeo komencis cirkuli en la popolo jam post la meza periodo de Tang-dinastio.

(El la vespera ĵurnalo *Jinwanbao*)

AMARAJ MANĜAĴOJ SANIGAJ

En la nuna tempo, kiam oni emas elekti manĝaĵojn aŭ estas frandema, oni devas preni iom da amaraj manĝaĵoj, tio estos utila ne nur por sorbi abundon da nutro, sed ankaŭ por reguligi la menson.

Japanaj sciencistoj konstatis post esplorado, ke la amara manĝaĵo entenas multe da aminoacido. Oni ekzamenis kaj analizis pli ol 30 specojn da aminoacido kaj trovis, ke pli ol 20 specoj havas amaran guston. Oni bone vidas, ĉu aminoacido ĉu sukero, ĉu ili estas amaraj aŭ dolĉaj, ili estas nutro nemankigebla por la kreskado kaj longa vivo de la homaro.

Iuj amaraj manĝaĵoj estas gravaj materialoj por prepari vitaminon B 17, kies ĉefaj elementoj estas cianido, benzaldehido kaj glukozo. Inter ili la kemia naturo de cianido ne estas vigla nek detruas normalajn ĉelojn de la homa korpo, sed havas mortigan forton kontraŭ kanceraj ĉeloj.

Amaraj manĝaĵoj havas intiman rilaton kun mensa stato de homoj. Ni prenu ĉokoladon, kafon, teon kaj bieron kiel ekzemplojn. Ili entenas certan kvanton da teobromino kaj kafeino. Manĝinte aŭ trinkinte ilin, oni povas refreŝigi la cerbon kaj senti sin komforte. Tio estas tre utila por malstreĉi la animstaton, forigi la cerban lacigon kaj reakiri la energion.

(El la ĵurnalo *Huanjingbao*)

Kajtoj de Yangjiabu

Fotoj de WU XINHUA

La kajtoj de Ĉinio havas historion de pli ol 2 000 jaroj. Oni flugigas kajton printempe por amuziĝo, ifoje dum flugigo oni rompas ĝian ŝnuron por esprimi sian sopiron al parenco aŭ amiko. Nun en Shandong-provinco ne mankas farejoj de kajtoj. El ili la plej fama estas Yangjiabu de la urbo Weifang. Ĝi havas multajn specojn de delikataj kajtoj, faritaj el fajnaj materialoj, kiuj flugas alte kaj stareme, kun koloraj bildoj sur si. La ksilografiaj novjaraj bildoj de Weifang ĝuas grandan famon kaj portas fortan stilon de la ĉina popola arto. Oni uzas ilin en farado de kajtoj. La



En la kajtofarejo de Yangjiabu



Kajtoj de Yangjiabu



Veterana artisto Yang Tongke en kajtofarado



Kajto de Yangjiabu

Internacia Kajta Festivalo de Weifang okazas ĉiun aprilon. En ĝi oni flugigas ĉefe kajtojn de Yangjiabu. La festivalo fariĝas ĉiam pli grandioza kun ĉiu jaro.




Budhostatuo

Temploj en

Teksto de DA WEI

Fotoj de YAN JIN

Temploj en la montaro



Nordoriente de Wutai-gubernio, Shanxi-provinco, kuŝas Wutai-montaro kun kvin nuboskrapantaj ebenaj pintoj. Sur ĝi dislokiĝas grandaj kaj malgrandaj temploj.


De antikve Wutai-montaro estas unu el la ĉinaj budhismaj sanktejoj. Ĝi kaj Emei-monto de Sichuan, Putuo-monto de Zhejiang kaj Jiuhua-monto de Anhui estas konataj kiel kvar famaj montoj de budhismo. En Wutai-montaro sidas 47 antikvaj temploj majestaj kun elegantaj skulptaĵoj kaj koloraj statuoj.

En Tayuan-templo estas brilanta blanka pagodo kun alto de 63 m kaj perimetro de 75 m. Ĝi estas la simbolo de Wutai-montaro.

Al la Bodisatva Templo



Wutai-montaro



En templa halo


Bronza pagodo de Xiantong-templo

En Xiantong-templo viciĝas sep originalaj konstruaĵaroj kun 400 ĉambroj.

Forlasinte Xiantong-templon, oni povas rigardi laŭvice Luohou-templon, Nanshan-templon kun fresko "Pilgrimo al la Okcidento" kaj statuoj de 18 arhatoj, Longquan-templon kun arkado el blanka marmoro kaj la Bodisatvan Templon en formo de drako.

En la jaroj 581-907 Wutai-montaro ekĝuis famon. Kaj en la jaroj 618-1279 ĝin vizitis monaĥoj el Japanio, Indonezio kaj Nepalo.

Wutai-montaro estas loko ne nur riĉa je historiaj restaĵoj, sed ankaŭ ideala por somerumado.



Poŝtmarkoj priastronaŭtiko

La maldekstraj 6 poŝtmarkoj estis emisiitaj la 30-an de okt. 1958, la 10-an de sept. 1959 kaj la 30-an de apr. 1960, memore al la unua artefarita satelito, satelito kun ĥundo, raketo al la luno kaj planed-stacio de Sovetunio.

La dekstraj 6 poŝtmarkoj estis emisiitaj la 1-an de feb. 1986, memore al la unua artefarita satelito "Dongfanghong 1", reprenita satelito, transporta raketo kaj telekomunika satelito de Ĉinio.

